

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

8

1998

ISSN 0032 - 4361

Ĉu Ĉinio kreskigos la ekonomion je 8%?

Adiaŭo al la Silka Vojo

Mebloj de Ming- kaj Qing-dinastioj



Ĉielarko super loĝkvartalo

Foto de LI YUWEI

INTER NI

Baziĝante sur la enhavo de la 3-a numero de ĉi-jara EPĈ mi volas atentigi vin sur kelkaj ĉiam revenantaj eraroj kaj strangaĵoj. Ne estas unuavice mia intenco kritiki, sed helpi vin eviti kelkajn deviojn gramatikajn kaj aliajn, kiujn regule oni povas renkonti en via revuo, kaj kiuj ĉiam denove mirigas min kaj iomete incitas. Do pardonu al mi, se miaj rimarkoj povus “inciti vin”.

P. 6: “Ĝi estis latise ĉirkaŭita...” Oni volas esprimi, ke latiso ĉirkaŭas ĝin; estas ĉirkaŭ ĝi. Do ĝi “estis ĉirkaŭata” de latiso.

P. 32: “La moskeo Etigar estas ĉirkaŭita de ili.” Devas esti “estas ĉirkaŭata de ili”...

Pri kelkaj strangaĵoj kaj “ĉinaĵoj”:

P. 33: “la loĝdomoj ĉe landlimo estas plej simplaj kaj plej belaj”. Ĉu tre, ege simplaj aŭ la plej simplaj kompare kun aliaj?

P. 7: “... en la skoria monto estis granda kvanto da neuzebla ŝtalo”. Laŭ mi, tiu ŝtalo

estis ankoraŭ uzebla, sed eble ne por la kompanio.

4-a numero, p. 24: “mi noktis en nova hotelo”. Kutime oni uzas tranokti.

1-a numero, p. 27: “maljuna puto”. Puto povas esti malnova.

LOOLEWIJK DE DORCKER (Belgio)

Jen parto el letero de nia entuziasma leganto Dorcker. Li donis tre valoran atentigon, do tio certe ne “incitis” nin, sed ĝojigis nin. Li ne devas diri “pardonu”, li tute meritas nian dankon. Ĉiam estas bonvenaj proponoj, sugestoj kaj kritikoj de niaj legantoj, ĉar ni konscias, ke ĉiuj aliaj legantoj estas samaj kiel li, kiu diras en sia letero: “Mi deziras al vi progreson kaj sukceson, kaj ke via revuo fariĝu ĉiam pli alloga, instrua kaj plaĉa al multaj legantoj.”

Ni kore dankas s-ron Dorcker kaj ĉiujn aliajn legantojn.

La Red.

El Popola Ĉinio

8 [479] 1998



Juna instruistino kun siaj lernantoj

Foto de Feng Jin

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"


Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P. O. Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

ENHANO

- | | | | |
|----|--|----|--|
| 2 | INTER NI | 25 | Junuloj en dezerto |
| 4 | Ĉinaj instruistoj en la nova periodo | 28 | Bovlingo en Ĉinio |
| 6 | JUNULARO:
Scienca revolucio bezonas junajn elitojn | 29 | LAŬ LA SILKA VOJO:
Adiaŭo al la Silka Vojo |
| 8 | EKONOMIE:
Natura gaso por Pekino; Ĉu Ĉinio kreskigos la ekonomion je 8%? | 36 | Fuzhou — 2200-jara urbo |
| 10 | ĈINAJ E-ISTOJ:
Mia maljuna amiko Liu Bingjun | 38 | Kia estas via nomo, virinoj? |
| 11 | KORESPONDI DEZIRAS | 40 | FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:
Urbanoj kaj iliaj profesioj |
| 13 | ESP-NOVAĴOJ | 42 | MULTNACIA ĈINIO:
Evenkoj kaj boacoj |
| 14 | Tropika urbo Haikou: por pli bona medio | 44 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 16 | Mebloj de Ming- kaj Qing-dinastioj | 46 | TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Ĉu vi konas la ĉinan monon <i>Renminbi</i> ? |
| 20 | Hongkong-aj elmigrintoj | 48 | Spaco de imago |
| 21 | HOMARO KAJ NATURO:
Tri manieroj por transiri Wujiang-riveron | 50 | SUR NIA LIBROBRETO:
Aspiro al sunleviĝo |
| 24 | POR KOMENCANTOJ:
Tibor Sekelj — filo de la naturo | 51 | ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Freskoj de Dunhuang |
| | | 2 | Ĉielarko super loĝkvartalo |
| | | | SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Niagaraj akvofaloj; Vintra pejzaĝo |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|---------------------|------------------------|
| 1. Shaanxi (p. 8) | 4. Heze (p. 44) |
| 2. Aoluguya (p. 42) | 5. Poyang-lago (p. 44) |
| 3. Fuzhou (p. 36) | 6. Hubei (p. 13) |

Ĉinaj instruistoj en la nova periodo

LA 10-a de septembro, t.e. la deka tago de la nova semestro, estas la Instruista Tago de Ĉinio. Tiutage en Ĉinio la instruistoj estas aparte atentataj de la publiko.

En Ĉinio jam de antikve estas la tradicio respekti instruistojn kaj alte taksi la edukadon. Konfuceo, edukisto antaŭ 2 500 jaroj, estis rigardata de la posteuloj kiel Sankta Majstro. En la feŭda socio sur kulta tabulo erudiciuloj gravuris la ideogramojn kun la signifoj de ĉielo, tero, suvereno, gepatroj kaj instruistoj kaj metis ĝin en honoran lokon de la ĉefa halo de sia domo. Ili opiniis, ke la edukado povas prosperigi la familion, kaj esperis, ke iliaj posteuloj estos erudiciaj generacio post generacio. Sed en la fino de la 20-a jc, kiam Ĉinio troviĝas en la nova periodo de ekonomia konstruado, prosperigi la nacion per scienco kaj edukado jam fariĝis tre grava principo. Fakte, ne ĉia eduko kondukas al nacia prospero, prudentuloj opinias, ke sole la edukado pri homa kvalito estas taŭga por komplete levi la nacian kvaliton en la venonta jarcento. Sendube, tio estas grava historia tasko por la ĉinaj instruistoj. Ĉu ili estas kapablaj plenumi ĝin? Hodiaŭ, kiam proksimiĝas la 14-a Instruista Tago, la tuta socio donas apartan atenton al tiu ĉi demando.

EN SCIENCA ESPLORADO

Ĝojinda estas, ke hodiaŭ la ĉinaj instruistoj faras diversajn provojn en instruado por levi la kvaliton de la lernantoj. La komuna celo de la provado estas fari la lernantojn mastroj en la lernado kaj la instruistojn edukisto-sciencistoj.

Nun oni donas grandan atenton al la provado de la plano pri solidareca renovigo far la ŝtata eduka ministerio. Ĝi estas nomata ankaŭ provado JIP, subtemo de la plano de UNESKO "Eduka Renovigo en Azia kaj Pacifika Regiono Servu al Disvolviĝantaj Landoj". En la lernejoj de Azia kaj Pacifika Regiono oni lernigas grandgrupe kaj sekve de tio la instrua kvalito estas malbona en la tuto, tial JIP en Ĉinio celas plamplekse levi la edukadon kvaliton kaj akceli la kompletan disvolviĝon de la lernantoj. En la pasintaj 8 jaroj de la provado jam elkulturiĝis aro da instruistoj por scienc-esplora celo.

La 26-jara Feng Hongrong instruas fizikon en la 65-a Mezlernejo de Pekino. Lia esplorado estas bazita sur pogrupa lernigo. Li diris, ke antikve la ĉina instruado estis farata en formo de buŝinstruado kaj poste naskiĝis privata lernejo destinita por aristokrataj



Liu Jianxun (maldekstre) kaj juna instruisto

gefiloj. En ĉiu privata lernejo laboris unu instruisto kaj lernis en ĝi kelke da knaboj, dum la lerniloj kaj lernohoroj ne estis fiksataj. En la 17-a jc. ĉeĥa edukisto Jan Amos Komensky kreis novan instru-metodon, t.e. instrui en grupo sub la kondiĉoj havi komunan lernolibron kaj fiksan klasĉambrom. Depost la 50-aj jaroj de la 20-a jc. la ĉinaj lernejoj funkciis por la geknaboj de la tutlanda loĝantaro kaj donis lecionon en granda grupo. Poste ili imitis la edukadon penson de I. A. Kajrov de Sovetio kaj prenis instruistojn, lernolibrojn kaj klasĉambrojn kiel centron en la lernejoj, tiel ke la lernantoj akiris kompare sistemajn fundamentajn sciojn. Kaj sekve de tio aperis problemoj: la instruistoj malfacile konas individuajn karakterojn de ĉiuj lernantoj, kio do pasivigas ilin en lernado. Usona edukisto John Dewey malaprobis la tezon de la tiel nomata centro. Li proponis, ke la edukado prenu la lernantojn kiel la centron, por ke tiuj lernu en faro. Kompreneble, ankaŭ iuj malaprobis la tezon de John Dewey. Ili opiniis, ke la tasko de la lernejoj estas heredigita kulturajn sciojn de la homaro. Ili devas fari rigoran intelektan trejnadon al la lernantoj kaj alte taksi aŭtoritatecon de la instruistoj. Nun en iuj evoluintaj landoj oni instruas en malgranda grupo kaj faras instruadon interesa, tiel ke la rilatoj inter instruistoj kaj lernantoj estas harmoniaj kaj la geknaboj akiras kreivecon, tamen iliaj fundamentaj scioj ne estas sufiĉe solidaj. Instruisto Feng opinias, ke la ĉina instruado, asimilinte la esencon de diversaj teorioj de edukado,

puŝis la lernantojn al memstareco en lernado. Tio montras la tendencon de la homa edukado, ĉar en la estonta socio nur tiuj, kiuj estos avidaj je scioj, povos bone vivi kaj sin disvolvi.

Tamen Ĉinio estas lando kun plej granda loĝantaro, tial instruado en granda grupo daŭros longe en la estonteco, ĉar tio bezonas malpli da areo kaj malpli da instruistoj. De kio do komenci la reformadon? Li opinias, ke antaŭ ĉio oni devas ŝanĝi la rilatojn inter la instruistoj, lernantoj kaj lernolibroj. La lernantoj devas scii, ke sen lernado aŭ malkovro ankaŭ la instruistoj kaj sciencistoj estas senciaj, samkiel ili. Kaj sekve de tio oni devas meti la tri faktorojn sur la saman startlinion por plialtigi la aktivecon de lernantoj. En la lernohoroj la instruistoj ludas nur enkondukan rolon. Ekz. dum instruado de la Unua Leĝo de Neŭtono la instruistoj devas atentigi la lernantojn, kiun malfacilon Neŭtono havis, ĉu oni povus refoje fari provon per la metodo de Neŭtono. Kiam la lernantoj rulis globon sur oblikva surfaco de vitro kaj tabulo kun malsamaj frotoj, ili trovis, ke ju pli glata estas la surfaco, des pli rapide kaj malproksimen la globo ruliĝas. Sed kio okazus sen froto? La lernantoj certe dirus, ke la globo ruliĝos senhalte. Tion ja indikas la Unua Leĝo de Neŭtono, ke sen ekstera forto la moviĝo kaj senmoviĝo estas eternaj. Gvidate de la instruisto, ili plenumis la malkovron, sed ne pasive akceptis sciencan konkludon. La instruisto substrekis, ke ankaŭ la lernantoj havas latentan forton de malkovro kaj oni devas ekspluati ĝin. La lernantoj estis interesataj de tio. La instruisto diris, ke sen partopreni en scienca esplorado pri edukado li multe klopodus por komprenigi la lernantojn.

AMO — ANIMO DE LA INSTRUISTA MORALO

En provado instruistoj malkovris, ke por la homa disvolviĝo la intelektaj faktoroj ludas ne tre gravan rolon, dum la neintelektaj tre gravan rolon, ekz., volo, memfido, pensmaniero k.a., el kiuj la sentoj ludas gravan rolon. Nur kiam la instruantoj amas siajn lernantojn, la lastaj intimas kaj kredas al la antaŭaj, diligente lernas kaj fariĝas mastroj en la lernado.

“Preni la lernantojn kiel siajn infanojn” estas tradicia virto de la ĉinaj instruistoj. La provado de harmonia eduko farata de Lixin-lernejo de Pekino prenas amon kiel la kernon de edukado. La provantoj opinias, ke la harmoniaj rilatoj inter la instruistoj kaj lernantoj estas garantio por kompleta disvolviĝo de la lernantoj en moralo, intelekto, fizika kulturo, estetiko kaj laborkapablo. Kaj sen amo ne estas harmonio. Juna instruistino Su Shu diris, ke por harmoniigi la rilatojn inter la instruistoj kaj lernantoj estas bezonata reciproka respekto, sen konsidero de la poentoj, ĉiuj lernantoj, inkl. de tiuj, kiuj ofte ricevas malaltajn poentojn, ne estas abomenindaj, kaj plie, iliaj malaltaj poentoj iagrade montras malsukceson en instruado, tial pro la malsukceso de la lernantoj ŝi ĉiam kritikis sin mem, sed neniam plendas kontraŭ

ili. Kompreneble, tio ne signifas ignori edukadon. Kiel ĉefinstruistino, ŝi lertas en sugesta instruado.

Multaj instruistoj proponas, ke oni donu profundan amon precipe al la lernantoj kun malaltaj notoj. Estis iu knabo, kiu plurfoje malsukcesis en ekzameno en la elementa lernejo, ĉiam silentis en la lecionoj post kiam li eniris en la mezlernejon. La granda prizorgo de la instruisto finfine malfermis lian animan fenestron. Li diris al sia instruisto: “Mi pensis, ke vi malŝatas min pro mia stulteco.” La instruisto diris sincere: “Mi ja pensas ke tio okazis pro mia stulteco, ĉar mi ne bone instruis vin.” Poste helpate de la instruisto, la knabo ne plu sentis humilecon kaj lernis pli kaj pli bone. La praktiko komprenigis la instruiston, ke la malfacile instruebla knabo mem ja estas problemo. Ju pli ĝi malfacilas, des pli ĝi utilas por eksciti kreivecon de la instruistoj, tiusence oni povas diri, ke la instruistoj ne nur instruas la lernantojn, sed ankaŭ lernas de ili.

AMO AL INSTRUISTOJ

En la nova periodo la junaj instruistoj estas feliĉaj, ĉar la tuta socio dediĉas grandan atenton al edukado. Lernejoj gvidantoj asertis, ke junaj instruistoj estas pensemaj, kreivaj kaj vastvidaj. Se ili okupiĝas pri didaktiko, ili certe pli frue rikoltos sciencajn fruktojn, tial multaj lernejoj invitas famajn instruistojn por helpi la junajn, rekomendas ilin al plua lernado aŭ partoprenigas ilin en diversaj konkursoj de instruado.

Kiam la edukado spertas grandan ŝanĝiĝon, la mezaĝaj kaj maljunaj instruistoj alfrontas defion ne nur en ŝanĝado de konceptoj kaj instrumentoj, sed ankaŭ en psikologia kaj fiziologia statoj. Konforme tion, la lernejoj donas al la mezaĝaj kaj maljunaj instruistoj kompensan edukadon kaj alte taksas ilian psikologian sanon. S-ro Liu Jianxun (Liŭ Ĝjanŝjun), estro de Lixin-lernejo, alte taksas la harmonion psikologian kaj median dum popularigo de la harmonia edukado. Li diris, ke, se la instruisto sentas malĝojon kaj instruas kun tiu sento, tio do povas malharmonigi la rilaton inter ili kaj la lernantoj, kio malutilas al la psikologia kaj fiziologia disvolviĝo de la lernantoj. Tial laŭ lia aranĝo, posttagmeze de ĉiu lundo, la instruistoj povas plene malkaŝi sian tutan malkontenton al lernejestro kaj post tio li solvas la problemon.

La lernejoj gvidantoj prizorgas la instruistojn en la laboro kaj ĉiutaga vivo, donas al ili harmoniajn medion kaj laborkondiĉojn, por ke ili laboru ĝoje kaj energie. Por la instruistoj la plej ĝojiga afero estas levi la kvaliton de la lernantoj. Kompreneble, en la Instruista Tago ili ofte ricevas neatenditan donacon. Matene, ĉe la lerneja enirejo la geknaba orkestro ludas gajan muzikon. En iliaj kabinetoj la seĝoj estas kovritaj per novaj kusenoj. Post laboro ili trovas, ke iliaj bicikloj estas purigitaj... En tiuj tagoj la lernejoj kaj eĉ la tuta socio faras laborojn utilajn speciale por la instruistoj. ■

Scienca revolucio bezonas junajn elitojn

Enketo montras, ke sciencistoj estas respektataj de multaj ĉinoj; per la strategio “prosperigi Ĉinion per scienco kaj eduko” la ĉina registaro montras sian sintenon pri eduko, scienco kaj tekniko. Aliflanke, la enuniversitatiĝa procentaĵo en Ĉinio estas nur 1.6%, dum tiu de la modernaj landoj devas esti minimume 15%; kaj la salajro de junaj sciencistoj estas malpli alta ol tiu de oficistoj en kompanioj. Parolante pri junularo kaj scienco, mi havas komplikajn sentojn. Tamen nin ĝojigas, ke, kvankam la scienca nivelo de Ĉinio ne estas tre alta, tamen la registaro kaj la popolo havas komunan konon pri la graveco de scienco kaj junularo. Ili multe subtenas sciencajn laborojn. Do mi kredas, ke la junaj elitoj el la ĉinaj sciencistoj komencos novan periodon tiurilate.

Yu Tao

PROSPERIGI ĈINION PER SCIENCO KAJ EDUKO

Dank’ al reformado kaj pordomalfermo, la ĉina ekonomio rapide progresas. Sed samtempe, la scienca nivelo de Ĉinio estas tre malalta, kompare kun la monde avangarda nivelo. Tio manifestiĝas en multaj flankoj, kiel ekzemple, la kvanto kaj kvalito de ĉinaj disertacioj publikigitaj en internaciaj aŭtoritataj akademias gazetoj, la nombro de gajnintoj de internaciaj sciencaj premioj kaj la apliko de scienc-esploraj fruktoj en produktado. Ĉio ĉi montras, ke Ĉinio ankoraŭ ne estas forta en scienco. Tion konscias la ĉina registaro. La menciita strategio ĝuste celas, ke Ĉinio havu sian lokon en la scienca revolucio.

En la 11-a kaj 12-a jarcentoj Ĉinio estis la plej avangarda en scienco kaj tekniko de la mondo, sed en la moderna industria revolucio Ĉinio postiĝis. Ĉu en la venonta jarmilo Ĉinio povos repreni sian gloron, tio dependas de junaj sciencistoj. Kiaj ili statas nun?

Ni fieras pri Chen Zhangliang, Feng Changgen, Bai Chunli kaj aliaj elstarantoj, samtempe nin ĉagrenas, ke mankas sufiĉe da junaj sciencistoj en Ĉinio. Laŭ statistiko en 1997, en la Ĉina Akademio de Sciencoj estis 3 800 esploristoj, inter kiuj preskaŭ 500 estis sub-45-jaraj.



D-ro Chen Zhangliang

En la jaro 2000 72% de la 3 800 emeritiĝos. Pro malalta salajro multaj junuloj forlasis la postenojn — iuj sciencistoj iĝis komercistoj, universitataj instruistoj — kompanianoj kaj doktoroj eklaboris en aliaj landoj.

Scienca revolucio bezonas junajn elitojn. Komence de la 80-aj jaroj okazis reformado en la ĉinaj sciencaj rondoj kaj estis starigitaj novaj sistemoj kaj konceptoj.

PLI DA BOLE-OJ BEZONATAJ

Bole-o estis spertulo pri elekto de fajnaj ĉevaloj en antikva ĉina mito. Li estas rigardata kiel simbolo de la maljunuloj, kiuj lertas

trovi kaj kulturaj talentulojn. Tamen facile troveblas bonaj ĉevaloj, sed malfacile Bole-oj. Tradiciaj konceptoj tre atentigas la spertecon kaj titolon, do por la senspertaj kaj senfamaj junuloj estas tre malfacile elstariĝi. Junaj sciencistoj bezonas pli da modernaj Bole-oj, veteranaj sciencistoj, kiuj lertas serĉi kaj volontas kulturaj ilin.

Chen Zhaoxiong akiris brilan atingon en studo pri maŝina tradukado. En 1992, 31-jara, li petis de la ŝtato subvencion por scienca esplorado. Tion faris ankaŭ Dong Zhendong, fama ĉina sciencisto pri maŝina tradukado. Informiĝinte pri Chen, Dong skribis al la Ŝtata Komisiono de Sciencoj de Ĉinio: “Chen faras pli gravan esploron ol mi. Do mi petas vin subteni lin. Mi volontas helpi lin.” Chen sukcesis kaj elektiĝis kiel “Elstara Junulo de Ĉinio”.

Dum sia vizito en Usono, Pan Naisui, biologia profesoro de la Pekina Universitato, konatiĝis kun Chen Zhangliang. Por ke Chen Zhangliang revenu Ĉinion kaj daŭrigu sian esploron, prof. Pan ĉesigis sian esploron, kolektis monon kaj fondis laboratorion.

Prof. Wang Xuan estas kreinto de la elektronika eldon-sistemo por ĉinaj ideogramoj de “Fonder de la Pekina Universitato”. En sia juneco li estis pioniro pri studado de la elektronika eldon-sistemo. Pasis 20

jaroj, "Fonder de la Pekina Universitato" iĝis alt-teknika kompanio-grupo, kaj li prenis sur sin la taskon kulturi junulojn. Li diris: "Ĉu mi havos grandan kontribuon aŭ ne, tio dependos de tio, kiom da junuloj en la grupo superos min." Nun li estas prezidanto de la Akademio de "Fonder de la Pekina Universitato", el kies laborantoj pli ol 90% estas sub-30-jaraj.

JUNULOJ RAPIDE KRESKU

Ekza prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj s-ro Zhou Guangzhao diris: "En Ĉinio ne mankas moralaj kaj kapablaj junuloj. Gravus, ke oni donu al ili la sistemon juste konkuri, por ke junaj talentuloj rapide kresku."

En 1982 naskiĝis la ĉina sistemo de scienca fonduso. Februare de 1986, fondiĝis la Ŝtata Komisiono de Fonduso por Naturaj Sciencoj de Ĉinio. Ĝia tasko estas, laŭ la ŝtata politiko pri scienca evoluo, subteni la fundamentan esploron kaj ekspluatadon de aplika fundamento. La fonduso venas ĉefe el registara asigno, kaj samtempe el mondonacoj de instancoj kaj individuoj ĉinaj kaj alilandaj.

Unu el la ĉefaj laboroj de la komisiono estas serĉi kaj kulturi junajn sciencistojn. En 1987 ĝi starigis la Junularan Scienca Fonduson, kiu subvencias la sub-35-jarajn kun nivelo doktora. Ĉiu el ili ricevas 30-40 milojn da juanoj (8.2 juanoj = unu usona dolaro). Jam estas kelkmil ricevintoj. Poste estiĝis speciala fonduso por mezaĝaj kaj junaj talentuloj, fonduso por ĉinaj studentoj en aliaj landoj, kiuj estas taskitaj labori aŭ lekcii por tempe en la patrolando. En 1994 aperis la Ŝtata Scienca Fonduso por Elstaraj Junuloj de Ĉinio. Ĝian subvencion ricevis jam pli ol 300 sciencistoj, kies averaĝa aĝo estas sub-38-jara, la plej juna el ili estas nur 29-jara. Ili studas sciencojn pri nombro, kemio, vivo, terglobo, inĝenierio kaj materialo, informo, administro...entute 49 fakoj. Tiuj fondusoj ne nur helpas enlandajn talentulojn, sed ankaŭ allogas ĉinajn studentojn el aliaj landoj.

La ĉina registaro kaj koncer-

naj instancoj helpas la junajn sciencistojn ankaŭ en iliaj laboro kaj vivo, diskonigas ilin per amaskomunikiloj. Inter la ĉiujare elektitaj "10 elstaraj junuloj de Ĉinio" ofte estas sciencistoj kaj teknikistoj. Estas ankaŭ elektado de elstaraj junaj sciencistoj.

Zhongguancun de Pekino estas "ĉina silicio-valo", kie kolektiĝas universitatoj, institutoj kaj alt-teknikaj kompanioj. Ĝin simbolas la skulptaĵo pri duobla-spirala strukturo de DNA (senoksidigita ribonukleata acido). Kiam Bai Chunli malkovris tiun ĉi strukturon, li estis iom pli-ol-30-jara. En novembro de 1990, per skana tunela mikroskopo (STM) produktita de li mem, Bai Chunli vidis la strukturon unuafoje en la homa historio. Nun li estas vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Retrorigardante sian vojon, li dankas unue la subtenon de la antaŭuloj, ĉar siatempe prezidanto Zhou Guangzhao donis al li multan helpon; due la supre menciitajn fon-

dusojn, ĉar li estas unu el la favoratoj; trie la sciencajn politikojn de la ĉina registaro, ĉar ili garantiis lian sukceson.


En novembro 1997 Chen Yongchuan, 33-jara profesoro de Nankai-universitato en Tianjin, ricevis en Parizo la Gaved Husain-premion por Junaj Sciencistoj de Unesko. Tio estis la dua fojo post Chen Zhangliang, premiita en 1991. Chen Yongchuan doktoriĝis en Usono kaj estas unu el la fruaj ricevintoj de la Ŝtata Scienca Fonduso por Elstaraj Junuloj de Ĉinio. 31-jara, li iĝis la plej juna profesoro de Nankai-universitato. Tie li fondis esplor-centron de diverĝa kaj kombina matematikoj. En 1994 li revenis Ĉinion, forlasinte altsalajratan postenon en Usono por fondi la centron. La favora politiko kaj subteno de fonduso decidigis lin fari la aferon. Nun li daŭre ricevas subvencion de la fonduso kaj, influate de li, rapide progresas multaj aliaj junaj sciencistoj de Ĉinio. ■

Feng Changgen (la dua de maldekstre) kaj liaj asistantoj en laboratorio



Natura gaso por Pekino

de XIAO SHEN



Rafinejo de natura gaso

GASODUKTO, 860 km longa, sin etendas de la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Baseno al Pekino. Ĝi estas la plej longa aŭtomata gasodukto kun granda kalibro en Ĉinio.

Mi vizitis s-ron Zhai Guangming, specialiston pri natura gaso, por koni la gasodukton kaj la ĝeneralan staton de natura gaso en Ĉinio.

S-ro Zhai konigis: La totala rezervokvanto de natura gaso en Ĉinio estas ĉ. 38 000 miliardoj da kubmetroj, el kiuj 30 000 miliardoj estas en la basenoj Sichuan, Shaanxi-Gansu-Ningxia, Tarim, Junggar kaj Qinghai, kaj 8 000 miliardoj en la Suda Ĉina Maro kaj Bohai-golfo.

Pri la rezervokvanto de natura gaso en la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Baseno, s-ro Zhai diris, ke la baseno situas en la limregiono de Shaanxi, Gansu, Ningxia,

Interna Mongolio kaj Shanxi. Norde de ĝi sterniĝas vasta stepo kaj sude de ĝi la Leŭsa Altebenaĵo. La baseno kovras 250 000 kvadratajn kilometrojn. Preskaŭ ĉie en ĝi rezerviĝas karbo, natura gaso kaj oleo. Tie la konstatita rezervokvanto de natura gaso estas 244 miliardoj da kubmetroj. Kvankam la kvanto estas malpli granda ol tiu en Sichuan-baseno, kies rezervokvanto de natura gaso estas 500 miliardoj da kubmetroj, tamen el ĉiu borita putro en tiu vasta regiono ŝprucas oleo. Nun estas ŝtopita la fluo de natura gaso en la orienta parto de la baseno. Prospektoroj trovis, ke la gaskampo sin etendas suden, norden kaj okcidenten kaj kovras pli ol 3 000 kvadratajn kilometrojn.

La gasodukto komenciĝas en la provinco Shaanxi, sin etendas orienten kaj finiĝas en Pekino transirinte 22 guberniojn kaj dis-

triktojn, 230 riverojn, 21 fervojojn, 131 ŝoseojn kaj sennombrajn montojn kaj valojn de la provincoj Hebei kaj Shanxi.


La gasodukto favoras unue Pekinon, ĉefurbon de Ĉinio.

De la lastaj jaroj, pro tro da fulgo kaj vostogaso ellasita de aŭtomobiloj la enteno de sulfura dioksido en la aero de Pekino multe superis tiun difinitan de la Monda San-Organizo. Por batali kontraŭ la media polucio la pekina magistrato faris decidon anstataŭigi karbon per gaso. En 1998-2000 Pekino konsumos sume 1.5 miliardojn da kubmetroj da natura gaso kaj konstruos 40 kvartalojn, kiuj ne uzos karbon. Pro utiligo de senpolucia energio kaj apliko de aliaj mediprotektaj rimedoj, kiaj reguligo de vostogaso, popularigo de uzado de bonkvalita karbo kaj vastarea verdigo, Pekino denove havos klaran ĉielon.

Dank' al la Shaanxi-Pekina Gasodukto, multaj loĝantoj en Pekino uzos puran naturan gason anstataŭ gason produktitan en koaksigado.

Funkciigo de la menciita gasodukto havos alian gravan signifon, t.e. marki grandskalan utiligon de natura gaso en Ĉinio. ■

Gasodukto etendiĝas tra la Leŭsa Altebenaĵo



Ĉu Ĉinio kreskigos la ekonomion je 8%?

de GUO TAI

PRO la financa krizo en iuj aziaj landoj kaj regionoj, la internacia socio donas apartan atenton al Ĉinio: Ĉu ĝi tenos stabilan interŝanĝan kurzon de la ĉina mono *Renminbi* kaj daŭrigos la stabilan disvolviĝon de sia nacia ekonomio?

Koncernaj fakuloj de Ĉinio faris argumentadon kaj profundan analizon kaj trovis la favorajn kaj malfavorajn faktorojn por la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. Ili prezentis al la ĉina registaro multajn proponojn. Profesoro Xiao Zhuoji de la Pekina Universitato diris, ke iuj opinias, ke en la lastaj jaroj Ĉinio kreskigis sian nacian ekonomion je pli ol 8% ĉiujare, ĉefe pro pliigo de eksportaĵoj kaj enkonduko de pli multaj alilandaj kapitaloj, dum ĝia enlanda bezono ne multe kreskis. Nun la financa krizo de la Sudorienta Azio malutilas al eksportado de ĉinaj varoj kaj sekve de tio la alilanda investado eble malkreskos, tial estas malfacile por Ĉinio ĉi-jare kreskigi sian ekonomion je 8%, tamen oni rimarkis, ke por disvolviĝo de la nacia ekonomio la ĉina registaro montris, ke ĝi certe atingos tiun ĉi celon. Sed kia maniere ĝin atingi?

Prof. Xiao analizis: oni ne devas diri, ke la financa krizo de sudorient-aziaj landoj havas nenian influon sur la eksporto de ĉinaj varoj kaj enkonduko de alilandaj kapitaloj, tamen ĝi estas multe malpli granda ol oni imagis, ĉar la sudorient-azia merkato konsistigas nur 22% de tiu de la internacia merkato por Ĉinio, kaj plie, nur 12% de ĉinaj eksportataj varoj similas al tiuj de la

sudorient-aziaj landoj, kaj krome, Ĉinio povas levi la kvaliton de siaj varoj por pligrandigi sian konkurencon povon en la internacia merkato.

Koncerne alilandajn kapitalojn, prof. Xiao diris, ke dank' al stabileco de la politiko kaj ekonomio de Ĉinio, internaciaj investantoj ne ŝanceliĝis en fido pri Ĉinio kaj ĝi siaflanke alprenis serion da rimedoj por garantii la eksportadon kaj enkonduki alilandajn kapitalojn.

Koncerne la enlandan bezonon, kiu influas la ĉinan ekonomion, prof. Xiao diris, ke modere eksciti la enlandan aĉetadon tre necesas por alta ekonomia disvolviĝo, nun la kresko de la detale venditaj varoj en Ĉinio ĝenerale estas malpli granda ol tiu de la malpez-industriaj varoj, la kresko de investo por fiksjaj kapitaloj estas malpli alta ol ekonomia kresko, tio montras, ke mankas la socia bezono de la investaĵoj kaj konsumaĵoj, kio malhelpas al kresko de la nacia ekonomio en la tuto. La ĉina registaro decidis en 1998 emisii monbiletojn en valoro de 150 miliardoj da juanoj kaj garantii, ke la investo por fiksjaj kapitaloj kreskos je pli ol 10%. Tiuj du rimedoj estos tre utilaj al la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio.

Por eviti la ripetadan konstruadon post pliigo de la investo, la ĉina registaro decidis investi ĉefe akvoutiligan konstruadon de la kampoj, konstruadon de fundamentaj instalaĵoj, disvolvon de altaj sciencoj kaj teknikoj, teknikan renovigon de entreprenoj, medi-protektadon,

konstruadon de loĝdomoj, disvolvo de la kampara merkato k.a. En la venontaj 3 jaroj Ĉinio investos 750 miliardojn da usonaj dolaroj por la fundamenta konstruado. Nun Ĉinio havas 140 miliardojn da usonaj dolaroj da eksterlandaj valutoj, la ŝuldo de Ĉinio estas en modera stato kaj ĝia ekonomia strukturo estas racia. Ĉio ĉi pruvas, ke la ĉina mono *Renminbi* ne devalutiĝos, ĉu por bezono de la ĉina ekonomio mem, ĉu por stabiligo de la azia ekonomio.

Fine prof. Xiao diris, ke juĝate laŭ progresado de la nuna ĉina ekonomio la ĝenerala stato estas normala, en la unuaj tri monatoj la eksportado de Ĉinio kreskis je pli ol 10%, dum la totala enlanda produktovalorero je 7.2%. ■

Paco-kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) por konsultiĝo pri internacia afero

Servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj:

Importo kaj eksporto de komercaĵoj;

Laboro en Ĉinio; internacia geedziĝo.

Adr.: Direktoro Ling Bo, P.O. Box 2, CN-230001, Hefei, Ĉinio.


Tel/Fax: +86-551-2632545; -4484606

Hejmpaĝo: <http://www.online.ah.cn/pac/>

Ret-poŝto: cnhflib@public.hf.ah.cn

Mia maljuna amiko Liu Bingjun

de WANG JIANBING



Liu Bingjun

MALJUNULO Liu Bingjun refoje skribis al mi. Mi ne scias kiel li trovas tempon por skribi tiel ofte. Por mi, kiu pli kaj pli dependas de telefono kaj ne de skribo en komunikado, ĉiu lia letero urĝas mian respondon.

84-jara Liu Bingjun naskiĝis en la jaro de tigro. Li aĝas pli ol mi je preskaŭ 60 jaroj. Sed en sia letero li subskribis "Via malsaĝa frato Bingjun" por montri sian humilecon, tio embarasis min.



Liu Bingjun (la dua de maldekstre) kaj Lee Chong-Yeong (la tria de maldekstre) en la Unua Azia Kongreso de Esperanto

Ĉinoj opinias, ke tigro simbolas reĝecon, aŭtoritaton, patoson kaj kuraĝon. Mi vidis en li ian karakteron de tigro.

En 1981, 67-jara, li eklernis Esperanton. Laŭ ĉinoj, "40-jaruloj ne devas lerni ion novan", tio signifas, ke por pli-ol-40-jaruloj lerni estas malfacile. Kvankam Esperanto estas facila kaj regula, tamen por ĉinoj, kiuj uzas ideogramojn, ĝi estas malfacile lernebla. Kvankam en sia 17-jara e-ista vivo li ne komponis gravan verkon pri Esperanto nek esperantigis gravan verkon, tamen li estas entuziasma movadano. Li korespondas kun alilandaj s-anoj kaj legas esperantaĵon. Li havas malmulte da ŝancoj paroli Esperanton, tial li parolas ĝin kun balbuto.

"La Mondo", organo de la Ĉina Esperanto-Ligo, estas ĝenerale ĉinlingva gazeto. De la fondiĝo de la gazeto Liu estas ĝia leganto. Li abonas ĝin ne nur por si mem, sed ankaŭ por siaj amikoj. En 1987 por multigi abonantojn de "La Mondo" en sia hejmloko, li mempage publikigis abonreklamon en ĵurnalo de Fujian-provinco kaj la nombro de abonantoj plimultiĝis je pli ol 400. La eldonkvanto de "La Mondo" estis malgranda kaj la prezo — malalta, kio malhelpis la redaktadon. Pro tio li tre maltrankvilis. Li ofte donacis monon al "La Mondo". Kaj krome, li ankaŭ proponis ne honorarii la kontribuantojn. Pro iuj kaŭzoj ni ne akceptis lian proponon kaj li mem neniam postulis de ni la pagon.

"La Mondo" publikigis liajn multajn poemojn. Li ofte verkas poemojn por la ĉina Esperanta movado. Sur liaj kovertoj ofte videblas liaj belskriboj kun fortaj strekoj. Foje, li verkis versoduon por s-ro Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA. La unua verso estas "Semu belaspektan Lantian-jadon", la dua — "Ĉiam estu meritulo por Esperanto". Laŭ la ĉina lingvo la unuaj ideogramoj de la versoduo kune legiĝas kiel la persona nomo de s-ro Lee Chong-Yeong. La unua verso venas de ĉina historia rakonto. Ĝi diras, ke Yong Bo semis legomon en Lantian kaj rikoltis jadon, poste li edzinigis al si belulinon per la jado. "Chong" en la ĉina lingvo signifas semi kaj "Yeong" — ĉiam. Per la dua verso Liu laŭdis, ke Lee Chong-Yeong estas meritulo por Esperanto. Ricevinte la versoduon, Lee Chong-Yeong tre ĝojiĝis kaj pendigis ĝin en okulfrapa loko de sia ĉambro.

Sur lia tablo estas tri objektoj: Foto de li kaj aliaj esperantistoj, kiu estis farita en la Dua Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Tangshan, Hebei-provinco, en 1992, kaj poste publikigita sur la kovrilo de "La Mondo". La maljunulo detondis ĝin

de la kovrilo kaj enkadrigis ĝin. La aliaj estas enkadrigita portreto de Zamenhof kaj orita statuo de Avalokitesvaro.

Komence, liaj gefiloj ne subtenis lin en Esperanto, poste ili rimarkis, ke akompanate de Esperanto, li estas pli aktiva kaj bonfarta. Do ili ne plu ĝenis lin.

Lastjare li partoprenis en diversaj Esperantaj aktivadoj de Ĉinio. Li faris albumon kun fotoj de siaj E-aktivadoj kaj titolis ĝin "Mia Jaro 1997". Aprile li partoprenis la seminarion de "Esperanta Turista Reto" en Guangdong, julie li ĉeestis la kunvenon de konsilantoj de la Fuzhou-a Esperanto-Asocio, kaj septembre li vizitis la Kunvenon de Membroj de la Sanming-a Esperanto-Asocio. Foje li eĉ naĝis en maro kune kun aliaj. Sur la foto li skribis: "Ĉi-jare mi estas 83-jara."

1998 estas jaro de tigo kaj koincidas kun 84-jara datreveno de la naskiĝo de Liu Bingjun. Laŭ ĉina tradicio, en la naskjaro oni devas porti ruĝan zonon ĉirkaŭ la talio kiel simbolon de paco. Mi ne scias, ĉu ankaŭ Liu portas ĝin ĉirkaŭ la talio, mi nur esperas, ke li kiel antaŭe partoprenos aktivadon kaj korespondos kun esperantisto-amikoj.

Sur mia tablo estas lia letero, kiu tekstas: "Kara Bing, kial vi ne skribis al mi dum longa tempo? Kiam vi edziĝis? Kiom da jaroj havas via infaneto? Mi kunsendas al vi unu usonan dolaron por esprimi miajn bondezirojn al ĝi. Skribu al mi ofte." ■

Liu Bingjun (meze) en la ceremonio de la fondiĝo de la Xiamen-a E-Asocio



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Lernantoj de du elementaj lernejoj dez. kor. kun samaĝaj esperantistoj. Se iu volas, tiu skribu al: Mao Hanchun, Shiyan Xiaoxue, Keqiao, 312030 Shaoxing, Zhejiang, Ĉinio; kaj al: Shi Xueqin, Baotalu Zhongxin Xiaoxue, 212002 Zhenjiang, Jiangsu, Ĉinio.

* Li Desen, 61-j. eksinstruisto, dez. kor. tm. Adr.: Li Shuying, Hangang Zidonghua Bu, 056015 Handan, Hebei, Ĉinio.

* Juan Gualberto Mones Castillo, 35-j., dez. kor. tm. Adr.: Morro 25912, en/ Celedonio Bernal y Final, Calabazar 19230, Ciudad Habana, Cuba.

* Membroj de nove fondita grupo Amikara Rondo Esperantista dez. serĉi kontaktojn en la tuta mondo. Adr.: Komarom - Szony, Petofi Sandor ut. 3., HU-2921 Hungario.

* Grazyna Byczkowska, 43-j. virino, dez. kor. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri danco kaj muziko. Adr.: ul. Podjazdowa 6, 60-480 Poznan, Pollando.

90-jara festo de UEA

Fotoj de FRANĈJO VEUTHEY



La nepo de la iniciatoro de Esperanto (maldekstre) tostas kun la prezidanto de UEA en la alteco de 100 metroj.



Historiisto Ed Borsboom konigas la vivon de la Mond Privat.




Mark Fettes prelegas pri Hector Hodler en la Biblioteko Hodler de UEA.



Atenta aŭskultado de prelego



Amika babilado ĉe la bankedo: (de maldekstre) Loes Demmendaal, Osmo Buller, Mark Fettes kaj Simonne Pols



Inter siaj prelegoj d-ro Ulrich Lins trovis tempon por butikumi en la libroservo.

ĈINIO

● Okaze de la 100-jariĝo de la Pekina Universitato kaj la 130-jariĝo de la fama ĉina edukisto kaj Esperanto-pioniro Cai Yuanpei (1868-1940), la ĉina societo “Amikoj de Esperanto” kaj aliaj organizoj kune aperigis Esperantan filatelaĵon la 4-an de majo. Cai Yuanpei memlernis Esperanton, kiam li studis en Germanio en 1907-1911. Poste li fariĝis direktoro de la Pekina Universitato en 1917, invitis la blindan rusan poeton Eroŝenko instrui Esperanton en la universitato, proponis “liberecon en scienca studo” kaj “kunekziston” de ideoj novaj kaj malnovaj kaj tiel igis la universitaton lulilo de la nov-kultura movado. (Qin Kaiji)

● Post sia fondiĝo la Donghu-a Esperanto-domo de Hubei-provinco plurfoje ricevis librojn donacitajn de samideanoj ĉinaj kaj alilandaj, inkl. de UEA, ĈEL kaj veterana ĉina esperantisto Li Naixi. Ĉiu-

monate en la domo kunvenis esperantistoj. (Peng Zhengming)

ARGENTINO

● La 52-a Argentina Kongreso de Esperanto okazos de la 9-a ĝis la 12-a de oktobro 1998 en urbo Pcia. R. Saenz Pena, prov. Chaco. La ĉeftemo estos “Kiel levi la profesinivelon de Esperanto”. Bonvolu anonci al la LKK eblan partoprenon de la programo. Adr.: Loka Kongresa Komitato, Calles 119 y 122, AR-3700 Pcia. R. Saenz Pena, Chaco, Argentino. (Ruben T. Diaconu Tkachenco)

JUGOSLAVIO


● Por disvastigi la internacian lingvon Esperanto kaj plifirmigi E-movadon en Balkan-duoninsulo, s-ano Joĉjo Ĝuriĉ, diplomito de internacia pedagogio de Esperanto, planas fondi E-muzeon, E-bibliotekon kaj E-organizon en najbara komunumo Grocka. La celo estas kolekti ĉion ligitan al

Esperanto, E-movado kaj E-literaturo. La biblioteko havos bibliografion, ordigitajn kaj klasifikitajn librojn kaj gazetojn. Bonvenaj estas ĉiuj E-aĵoj el la tuta Esperantujo. Sendu al: Esperanto, 11307 Boleĉ P. F. 5 Serbio, Jugoslavio. (Esperanto)

USONO

● Por honori Cathy Schulze je ŝia 85-a naskiĝtago la 4-an de novembro 1998, sendu historieton, seriozajn aŭ humurajn (1-3+ paĝan unuflankan) en Esperanto aŭ la angla kaj/aŭ fotojn. Menciuj la jarojn kaj okazojn — se vi memoras. La celo estas ke ni ne perdu ĉion, kion ĉirkaŭmonde faris Bill (m. 1993) kaj Cathy Schulze por la Esperanto-movado. Poste libreto aperos. Sendu kiel eble plej rapide al: Dori Vallon Wheeler, P.O. Box 74, Goldendale WA 98620 Usono. Ret-poŝto: dwheeler@gorge.net

Fakso: 509-773-4177. (Doris Vallon Wheeler)



纪念北京大学建校一百周年暨著名中国民主革命家、教育家 and 世界语运动先驱蔡元培诞生一百三十周年



蔡元培 1868-1940

CELEBRE AL LA 100-A FONDIĜA DATREVENO DE LA PEKINA UNIVERSITATO KAJ LA 130-A NASKIĜA DATREVENO DE CAI YUANPEI, FAMA ĈINA DEMOKRATISMA REVOLUCIULO, EDUKISTO KAJ PIONIRO DE LA ĈINA ESPERANTO MOVADO



北京 77号信箱

中国报道社



中国世界语交友会 (地址: 北京百万庄路24号 邮政编码: 100037)

邮政编码

Memorkoverto por la 100-a datreveno de la fondiĝo de la Pekina Universitato





Tropika urbo Haikou: por pli bona

Haikou, ĉefurbo de Hainan-provinco, suda Ĉinio, estis titolita de la Monda San-Organizo de UN kaj la Ministerio de la Publika Sano de Ĉinio maje de 1995 kiel la unua eksperimenta Sana Urbo en Ĉinio.

Krei sanajn urbojn tra la tuta mondo estas nova strategio de la Monda San-Organizo por respondi la defion, kiun la tutmondaj industriigo kaj urbanizo direktas al la homa sano. Kreo de la monda sana urbo vekis ĉe la Haikou-anoj grandan atenton pri la media kvalito. Ĉiujare, en la arboplanta tago ĉiu kvaropo da Haikou-anoj plantas po unu arbon. Ili arbarizas marbordojn kaj ambaŭ flankojn de la novaj ŝoseoj. Tie ĉiuj lernejoj, registaraj institucioj, entreprenoj kaj familioj aktivas por la sana urbo. Haikou havas 600 000 loĝantojn, kiuj nun vivas bonan vivon, kaj la urbo mem estas enlistigita kiel unu el la 50 ĉinaj modernaj pordmalfermaj urboj. Tie belas tropikaj pejzaĝoj, la ekonomia kaj media konstruado disvolviĝas rapide. Ĉiujare ĝia ekonomio kreskas meze

je 33.2% kaj la tuta urba medio akiris grandajn sukcesojn en sia sinteza bonordigado. En la pasintaj 2 jaroj ĝi estis dufoje aljuĝita kiel unu el la 10 bonordigitaj kaj higienaj urboj de Ĉinio. Ĉiujare la urbo asignas grandan sumon da mono al la urba verdigado. Tie aperis novaj parkoj, botanikaj ĝardenoj kaj marbordaj feriejoj, per kiuj oni metis novan mejloŝtonon en la historio de tiu kokosarba urbo. Nun 39% de la urbo estas kovritaj de verdaĵoj kaj la loĝantoj havas po 8.4 kvadratajn metrojn da verda tero. Pli boniĝas ankaŭ la higienaj, kuracaj kaj sanprotektaj instalaĵoj en la urbo.


Antaŭ nelonge la urbo komencis efektiviĝi dek projektojn por publika sano kaj pli bona medio. La produktobazo de senpoluaj legomoj jam konstruiĝis parte. La nova fabriko, kiu povas trakti 300 000 tunojn da malpura akvo ĉiutage, estis finkonstruita kaj la fabriko, kiu ĉiutage traktas 1 200 tunojn da rubo, elvomita el ĉiutaga vivo, estas en konstruado.



En produktejo de trinkakvo



Kontrolo de vostogaso de aŭtomobilo



Analizo de elementoj de pezaj metaloj en aero



Kontrolo de aera kvalito

Por pliiigi la kapablon de akvolivero kaj levi la akvan kvaliton, oni komencis novan akvoutiligan konstruadon kaj finkonstruis 17 akvotraktajn fabrikojn kaj akvoliveran reton. Oni diris, ke en Haikou la aera kvalito jam atingis la unuan gra-

don en Ĉinio kaj la akva kvalito ĉe la marbordo atingis la unuan aŭ duan gradon en Ĉinio. Ni estas certaj, ke post nelonge bela kaj sana urbo Haikou, tute konforma al la normoj de la Monda San-Organizo, aperos en la mondo.

YI YUN:

Mebloj de Ming- kaj Qing-dinastioj


EN 1996 okazis en Nov-Jorko aŭkciado de 107 klasikaj ĉinaj mebloj. 90% el ili estis aŭkciitaj per prezo pli alta ol la minimuma, iuj eĉ per prezo dekoble pli alta. Granda ekzano el palisandro (*Dalbergia hainanensis*) estis aĉetita de usona muzeo kontraŭ miliono da usonaj dolaroj. Nun, en multaj famaj muzeoj de la mondo estas klasikaj ĉinaj mebloj.

En Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) la klasikaj ĉinaj mebloj atingis la kulminon de siaj praktikeco kaj artismo.

Dank' al la tiama specifa kulturo, Ming-dinastiaj mebloj distingiĝis per aparta eleganteco kaj furoris ĝis la unuaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911). La privataj ĝardenoj de Ming-dinastio, projektitaj de kleruloj, enkorpiĝis iliajn estetikajn sentojn. Ili deziris, ke la mebloj en la ĝardenoj servu ne nur al la materia vivo, sed ankaŭ al la spirita. Pro tio, ili proponis, ke la mebloj forme kaj dekore estu antikve-

caj, elegantaj kaj delikataj, opo- nante kontraŭ la nura gravurado kaj lakado en meblofarado. Unu el la Ming-dinastiaj brakseĝoj kun apogiloj neelstaraj portas la nomon Wenyi (la vorto signifas porklerulan seĝon). Ĝi, distingiĝa per agrabla mildeco, tre plaĉis al poetoj kaj pentristoj de Ming- kaj Qing-dinastioj.

Influite de la menciita kulturo, formiĝis la stilo de Ming-dinastiaj mebloj, kiu montriĝis unue en elekto de materialo. Fajnaj mebloj de Ming-dinastio estas faritaj el palisandro, mesuo (*Mesua ferrea*) kaj aliaj lignoj bonkvalitaj, malmolaj kaj subtilaj. Palisandro havas naturajn vejnojn similajn al pimpaj ondoj; pterokarpo — kvietajn kolorojn kun vejnoj neeviden-




Palisandra seĝo kun alta dors- apogilo (Qing-dinastio)

taj. Tiam vivis kaligrafo, kiu gravuris sur sia pterokarpa seĝo ĉinan skribon kun la teksto: Sidante sur tiu ĉi seĝo en libera tempo, mi prenas unu tagon kiel du. Se mi povos vivi 70 jarojn, do ŝajnas, ke mi havos 140 jarojn. El tio videblas, kiel grandan spiritan ĝuon alportis al la homoj la bonkvalitaj mebloj el malmola ligno.

Kompare kun tradiciaj laktaj mebloj, tiuj el malmola ligno distingiĝas per delikateco kaj eleganteco de framo. Ming-dinastiaj mebloj estas faritaj per kunigado de tenonoj kaj mortezoj. La meblo kun tia framo kun dekoj da harmonie kombinitaj lignopecoj estas facile portebla kaj fortika. Tia strukturo estas rigardata kiel kristalo de kelkmiljara kulturo kaj saĝo de la ĉina nacio.

La linioj de Ming-dinastiaj mebloj karakteriziĝas per diverseco kaj plastika ŝanĝiĝemo. La konturoj de brakseĝo forte impresas en harmonia kombino de ĝiaj partoj. S-forma linio sur dorsapogilo de brakseĝo estis laŭdata de okcidentaj sciencistoj kiel la plej bela "Ming-linio" de la Oriento.

Post Ming-dinastiaj mebloj aperis Qing-dinastiaj mebloj



Ilustraĵo de klasika romano pri seĝoj en formo de ĉapo de altrangulo



Pterokarpa brak-seĝo (Qing-dinastio)

novtipaj kaj unikaj. Pro ekonomia disvolviĝo la Qing-dinastiaj nobeloj deziris pli luksan vivon. La mebloj, projektitaj laŭ ilia estetika vidpunkto, estis pli belaj kaj pli luksaj ol tiuj de Ming-dinastio.

La mebloj de Qing-dinastio diferencas per variado de formo. Aparte menciindas rondaj mebloj, precipe rondaj tabloj, originalaj pro siaj mirindaj strukturo kaj formo. Iuj mebloj kun ebena surfaco en formoj ume-flora, ventumila kaj poligona distingiĝas per granda aprecio.


La Qing-dinastiaj mebloj plejparte estas grandaj kaj pezaj

kun diversaj reliefoj pri birdoj, bestoj, pejzaĝoj kaj homfiguroj. Ili estas faritaj el malmola ligno, taŭga por gravurado kaj rebri-lanta post polurado. Krom marmoro kaj perlamoto, ankaŭ jado, eburo, agato, kristalo k.a. estas uzataj por meblo-dekoracio. Iuj riĉaj familioj ornamis siajn ĉambrojn per 8 aŭ 10 specoj de seĝoj por montri sian majestecon kaj riĉecon.


Nuntempe, mebloj de Ming-kaj Qing-dinastioj estas altvaloraj por konservado. Tiuj mebloj prezentas ekonomion, kulturon, arton kaj morojn de la antikva socio. ■




Pterokarpa Wenyi-sego en formo de ventumilo (Ming-dinastio)



Incenso-tablo kun desegnoj de ume-floroj (Qing-dinastio)



Palisandra subportilo (Qing-dinastio)



Benko (Ming-dinastio)



Pterokarpa pentrotablo kun gravuraĵo de fungoj (Ming-dinastio)



Dormoĉambraj mebloj (Qing-dinastio)



Faldebla Wenyi-seĝo (Qing-dinastio)



Pterokarpa incenso-
tablo kun gravuraĵo de
drakoj (Ming-dinastio)



Palisandra lito (Ming-dinastio)



Palisandra seĝo (Qing-dinastio)



Largâ pterokarpa trono
(Qing-dinastio)



Pterokarpa brak-seĝo inkrustita
per brokateĵo (Qing-dinastio)



Hongkong-aj elmigrintoj

EN la pli ol dek jaroj antaŭ ol Hongkong revenis en la sinon de la patrolando en 1997, ĉ. 600 000 loĝantoj forlasis Hongkong kaj ekloĝis alilande. El ili malmultaj maltrankvilis pri la perspektivo de Hongkong, kaj plejparto estis allogita de la plano de iuj landoj pri emigrado. Tiu plano allogis precipe riĉajn loĝantojn kaj fakulojn de Hongkong. Laŭ statistiko, 90% de tiuj elmigrintoj transloĝiĝis en Usonon, Kanadon kaj Aŭstralion.

En iuj loĝlokoj de elmigrintoj jam formiĝis malgrandaj rondoj de Hongkong-anoj. Ili parolas la Guangdong-an dialekton, manĝas Guangdong-ajn pladojn, malofte kontaktas lokanojn kaj malfacile kunfandiĝas kun la loka socio pro psika obstaklo, tial ili havas ĉagrenon ĉefe en la spirito. Plejparto de ili vivis bone en Hongkong kaj ne suferas de materia malsufiĉeco ankaŭ en aliaj landoj. Ili denove havigis al si riĉaĵojn, sed sentas ĉiam malkvietecon. Ili suferas de pli kaj pli granda nostalgio kaj kultura diferenco. Tiu kondiĉo iuj el ili forlasis sian antaŭan decidon kaj revenis al Hongkong, dum aliaj intencis reveni al ĝi post kiam ili akiris alilandan pasporton. Laŭ statistiko, de 1991 ĝis 1997 en Hongkong la nombro de la homoj kun alilanda pasporto kreskis je 11.5%, kaj el ili plejparto estis novaj elmigrintoj. Pro la glata reveno de Hongkong en Ĉinion, nur 30 900 Hongkong-anoj elmigris al aliaj landoj en 1997, sed en 1992 la nombro estis 66 200. En 1997 la nombro de tiuj, kiuj elmigris al Aŭstralio, malleviĝis je 70% kompare kun tiu en 1996.

Por siaj propraj interesoj multaj Hongkong-anoj, precipe la junaj, havis pordmalferman sintenon pri la vivo en la pasintaj jaroj. Iu diris, ke pro ajna bagatelo forlasis Hongkong kelke da homoj. Tamen la financa krizo, okazinta en Azio en la pasinta jaro, ja estis ne bagatelo, tamen ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne okazis nova tajdo de elmigrado de Hongkong-anoj. Oni diris, ke iuj elmigrintoj jam revenis al Hongkong, dum aliaj atendas ŝancon. Ili pretas reveni al

bileton de aviadila veturo, sed reveninte al Hongkong, ili trovis, ke tie ĉio restas senŝanĝa, ili do malmendis la reiran.”

Estas ankaŭ iuj elmigrintoj, kiuj vivis bone eksterlande, tamen revenis al Hongkong, ĉar ili maltrankvilis pri la ŝtataneco de siaj posteuloj. Post glata reveno de Hongkong ili denove taksis sian antaŭan decidon kaj konkludis, ke ili preferas reveni al Hongkong ol longtempe vivi alilande. La alta salajro kaj malalta imposto en Hongkong ja estas allogaj. Kun fakaj scioj ili povas disvolvi sin kaj estos tre bone por iliaj gefiloj studi en Hongkong.

Rememorante la tajdon de elmigrado en la pasintaj jaroj, multaj el ili sentas grandan bedaŭron. Tiam pro amasa entrudiĝo de Hongkong-anoj, la prezo de domoj en iuj landoj kreskis 1-3-oble, sed nun sur la fasado de tiuj domoj pendas tabulo kun vortoj “Por vendo” kaj je triono malleviĝis la nombro de klientoj de restoracioj, kiuj antaŭe servis ĉefe al Hongkong-aj elmigrintoj. Post kiam Hongkong revenis al Ĉinio, la Hongkongaj deponantoj en banko de Kanado malpliiĝas: En la fino de 1997 la nombro de Hongkong-aj deponantoj malkreskis je 70% kompare kun tiu en la sama periodo de 1996, kaj plie,

en la sama tempo la sumo de mono poŝte sendita el Hongkong reduktiĝis je 60%. Enketo montras, ke post kiam Hongkong revenis al Ĉinio, iuj Hongkong-aj elmigrintoj, al kiuj mankis fido pri la perspektivo de Hongkong, denove fariĝis fidoplenaj kaj ĉiuj Hongkong-anoj estas fieraj pri la solena ceremonio transdoni al Ĉinio la suverenecon super Hongkong. ■



Akirinte administran magistrecon en Aŭstralio, Gan Yaocheng kaj lia edzino revenis en Hongkong kaj laboras kiel prezidanto kaj vicprezidantino de la Asocio de Junaj Komercestoj.

Hongkong tuj post kiam malaperos la financa krizo en Azio. Ankaŭ iuj tenas sin aparte optimismaj. Ili diris: “La financa krizo estas bona ŝanco kaj nun la prezaro en Hongkong estas malalta. Tio estas oportuna por daŭra disvolviĝo.” Mastro de vojaĝservo en la loĝloko de Hongkong-aj elmigrintoj diris kun bedaŭro: “Multaj klientoj aĉetis ir-reiran

TRI manieroj por TRANSIRI WUJIANG-RIVERON

Teksto kaj fotoj de LIU SHIZHAO

Wujiang-rivero fluas inter montoj en sudokcidenta Ĉinio. Tie la topografio estas karsta kun profundaj valoj, ravinoj kaj altaj krutaĵoj. Por la tieaj loĝantoj transiri la riveron estas ofte renkontata problemo.

Por tiuj, kiuj loĝas en Weng'an-gubernio, en la meza baseno de la rivero, kvankam norde de la gubernio je 50 km. estas pontego Jiangjiehe, tamen ĝi estas malproksima de la gu-

bernio, tial ili preferas transiri la riveron per kabloj pajlaj, bambuaj, feraj ktp. Antaŭ ol transiri la riveron oni devas elekti taŭgajn startlokojn laŭ akvonivelo kaj meti provizoran kablaron. Oni kunligas protektaĵon kun la talio, direktas sin al la alia bordo, kaptante la kablaron per la du manoj, forte premas la bordon per la piedoj, post tio tuj volvas la kablaron per la piedoj kaj tiele oni glitas al mezo de la rivero, de tie


grimpas per la manoj kaj atingas la alian bordon.



Por transiri la riveron funkcias ankaŭ diversaj pramoj, ĉi tie estas pramoj ŝtata, popola, volontula kaj privata. Pro kirlo, oni devas haŭli pramon ĉe la bordo. La pramado ja estas danĝera iagrade.

Kabloponto, pramo kaj pontego Jiangjiehe, tiuj tri funkcias samtempe en Weng'an por transiri Wujiang-riveron.



Pramado





1. Ponto super Wujiang-rivero
2. Pajla kablo instalata
3. Wujiang-rivero
4. Kaskado ĉe groto
5. Transiro de la rivero

Tibor Sekelj — filo de la naturo

de PAVLE MLADENOVIC* (Jugoslavio)

MI ŝatas legi vojaĝpriskribojn kaj pristudi vivojn kaj verkojn de esploristoj. Proksimume unu jaron antaŭe, mian atenton aparte allogis Tibor Sekelj, ĉar mi eklegis liajn librojn.

Kiu estis Tibor Sekelj, senlaca esploristo, verkisto kaj loĝanto de la mondo? Li naskiĝis en 1912 en la vilaĝo Spiška Subota, sur la teritorio de Slovakio, apartenanta tiutempe al Aŭstrio-Hungario. Jam en la infanaĝo li revis pri la foraj landoj kaj pristudis mapojn. Iufoje la gepatroj lin trovis funde de la ĝardeno, kie li fosadis truon kun intenco foriri tra la tero al Ameriko. Pli poste, kun la gepatroj, li transloĝiĝis al Banato, kie li pasigis sian infanecon kaj finis mezlernejan studon en Nikšić kaj juran fakultaton en Zagreb. Jam en la mezlernejo li ekŝatis montgrimpadon kaj piedirante li transiris la tutan Montenegron. En 1939 li foriris al Argentino, kie li ellernis la hispanan lingvon kaj fariĝis ĵurnalisto. Li konatiĝis kun Linko, grava monda alpinisto, kun kiu li konkeris Akonkagvon (ĉirkaŭ 7 000 m.) en 1944. Tiuokaze, multaj membroj de ekspedicio pereis. Nur Sekelj savis sin kun ankoraŭ duopoj kaj pri tio pli poste li verkis belegan libron “Tempesto super Akonkagvo”.

La libron li verkis en du versioj kaj ili ambaŭ estis disvenditaj. Pli poste, eldonistaj domoj financadis al li ekspediciojn, kaj li mem laŭ kontrakto verkis la libron pri ekspedicio.

La sekvanta esplorado estis direktita al ne sufiĉe konataj regionoj de brazilaj praarbaroj. Tio okazis en 1948/49. En tiu vojaĝo li trafis kanibalan tribon Tupari, kun kiu li vivis 4 monatojn.

Paralele kun esploradoj, Sekelj sin okupis pri arkeologio kaj antropologio. En Gvatemalo

li pristudis la civilizacion de majaoj en Meksikio kaj inkaoj en Peruo. Li malkovris antikvan belan urbon, surbaze de legendoj pri ĝi, kiun konstruis malpli civilizitaj indianoj. Kiam li iris al Amazonio, profitante pli fruan sperton, li sukcesis kun ekspedicio transiri la Riveron de Morto kaj trairis teritorion de batalema gento Ŝavano kaj kolektis multe da utilaj geografiaj donitaĵoj pri tiu regiono.

En la kvindekaj jaroj Sekelj revenis al Jugoslavio, ekloĝis en Beogrado kaj post kelkaj jaroj sin turnis al esplorado de Azio. Kvar jarojn li pasigis en Hindujo. Ĉie, kie li restadis, li fondis Esperanto-societojn. Li migris ankaŭ tra Afriko. Li suprenrampis Kilimanĝaron, la plej altan pinton de Afriko. Dum sia vivo li okupiĝis pri diversaj agadoj. Li estis esploristo, verkisto, arkeologo, pentristo, skulptisto, reĝisoro kaj ĵurnalisto. Li uzis dudek lingvojn, el kiuj dek li bone parolis. En 1972 li ĉesis sin okupi pri terrenaj esploradoj kaj ekoficis en Muzeo de Subotica. Por sia laboro kaj esplorado li gajnis multnombrajn rekompencojn kaj li estis membro de la prestiĝa Brita Geografia Societo.

Liaj plej signifaj verkoj estas “Tempesto super Akonkagvo”, “Tra la lando de indianoj” kaj “La konkero de la montoj”.

Tibor Sekelj estis vere la filo de la naturo. Li vivis por sciencoj kaj esploris nekonatan naturon. ■

* La aŭtoro estas 12-jara lernanto. Li legis multajn literaturajn verkojn kaj estis intervjuita de raportistoj de ĵurnaloj, gazetoj kaj televizio. Tiu ĉi artikolo estis publikigita en lerneja revuo kaj esperantigita de s-ano Jovan Neic el la serba.

Junuloj en dezerto

de SI GONG kaj YA PING




En okcidenta Ĉinio situas la vasta Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kie sternaĝas senlima dezerto kaj vivas malmulte da homoj. Tamen en Qiemogubernio, sude de la dezerto Taklimakan, troviĝas la plej malgranda flughaveno de Ĉinio, kie laboras 26 junuloj por la ĉina civila aviado.

En Qiemo loĝas 50 mil ujguroj. La maloportuna trafiko kaj malbonaj naturaj kondiĉoj malhelpis la ekonomian evoluon de la loko. La registaro konstruis flughavenon tie. En junio 1979 la flughaveno ekfunkciis, kaj tien venis junuloj. Ili diligente laboras por garantii la navigadon, plibonigante la labor- kaj vivmedion. En la lastaj 20 jaroj ili plantis dekmilojn da poploj kaj multajn herbojn. Nun la poploj bone defendas la flughavenon kontraŭ vento kaj sablo.

Kiam oni flugas super la dezerto, oni vidas oazon — ĝi estas Qiemoflughaveno.

Korbopilka konkurso






Post laboro



Surteriĝo



Flughaveno en la dezerto



Legomĝardeno en la dezerto



Flugpilko-ludo



En meteostacio

Bovlingo en Ĉinio

“**I**ru ludi bovlingon,” antaŭ 3-4 jaroj tion diris certe urbaj junuloj, kiuj opinias, ke en bovlingo-ludo ili estas ne nur ŝajne modaj, sed ankaŭ ŝajne elegantaj en la okuloj de la amatinoj, kvankam iliaj ludmovoj ne estis belaj.

Nun tion diris plejparte mez-aĝuloj. Ili ne ĉiam indiferentas al freŝaĵoj; cetere por ili la kosto de bovlingo-ludo estas ne tre multa. Kaj por junuloj, pri bovlingo ili trovas pli modan esprimon: Iru ŝviti — nun ili interesigas pri tio, kiel fari pli forte turniganta la globo-ĵeton.

Komence de tiu ĉi jarcento bovlingo eniris en Ĉinion. Tiam en Ŝanhajo, Tianjin kaj Pekino estis kelkaj bovlingo-ludejoj kun

simplaj ekipaĵoj kaj servistoj speciale por kolekti la globojn kaj starigi la “botelojn”. Post la 50-aj jaroj bovlingo preskaŭ malaperis en Ĉinio, eĉ malmuntitaj estis la ekipaĵoj.

En 1981, kunlaborante kun usona kompanio Jinjiang-(Ĝinĝjang)-hotelo de Ŝanhajo produktis ses aŭtomatajn globtunelojn. Tio signis reaperon de bovlingo en Ĉinio. Nelonge poste kelkaj globtuneloj sterniĝis en Pekino, pli kaj pli multaj homoj ekkonis bovlingon, kiu, tiam ligita plejparte kun brila rango aŭ alilandanoj, estis rigardata kiel sporto por “nobeloj”.

Kvankam ĉinaj profesiaj ludantoj foje gajnis medalojn en internacia konkurso, tamen nur post

1996 bovlingo disvastiĝis de “nobeloj” al ordinaraĵoj popolanoj, dank’ al plimultiĝo de globtuneloj. Ĝis la fino de 1997 en Ĉinio troviĝis dudek mil globtuneloj. Fakuloj deklaris, ke tio estas la unua tajdo de bovlingo en Ĉinio.


3-4 jarojn antaŭe, nur malmultaj homoj ludis bov-

lingon pli por ĝui la envion de tiuj modĉasantoj ol por ĝui la sporton mem. Kun tempopaso meze salajrataj junuloj, eĉ mezlernejoj, partoprenis la ludon. Nur tiam, kiam iliaj gepatroj hazarde vizitis bovlingo-ludejon, ili komencis efektive senti la esencon de bovlingo: amuzo saniga kaj eleganta, ĝojo ricevebla post detruado. Krome la diversaj avantaĝoj enlistigitaj de sportologoj interesis pli multajn homojn. En la ora tempo, kia semajnofina vespero, ofte estas ege multaj ludantoj en la bovlingo-ludejoj. Tiukaze la ludantoj, kiuj sin preparas por ludŝuoj kaj globoj, devas mendi ludlokon antaŭ du tagoj.

Prosperiĝo de bovlingo-ludo vidigis profitigan ŝancon al la komercistoj pri rilataj ekipaĵoj. En ĉinaj urboj 90% de la globtuneloj devenis de aliaj landoj. Pri tio fakuloj klarigis, ke produktado kaj disvolvo de bovlinga ekipaĵo, kiuj bezonas altan sciencan kaj teknikan, ankoraŭ estas malaltnivelaj en Ĉinio. Kaj ĉinoj klopodas evoluigi la nacian produktan industrion pri bovlingo.

Tamen la prospero de bovlingo ne povas kaŝi tian fakton, t.e., en Ĉinio nur iomete da homoj finance fortaj povas ofte viziti bovlingo-ludejon, ĉar por multaj salajruloj bovlingo-ludo ankoraŭ estas multekosta. Popularigi la sporton certe bezonas longan tempon. Iuj eĉ opinias, ke populariĝo de bovlingo en Ĉinio eble realiĝos post 2010. ■

Ludo de bovlingo





Adiaŭo al la Silka Vojo

Ekde 1995 ni kvin-foje sendis raportistojn al Ŝaanŝi (Ŝenŝji), Gansu, Interna Mongolio kaj Xinĝiang (Ŝinĝjang) por vizito. Dum tiuj tri jaroj niaj raportistoj laŭeble konigis la Silkan Vojon al niaj legantoj.

Niajn raportistojn multe inspiris la naturo kaj historiaj restaĵoj ambaŭflanke de la Silka Vojo. La vizito donis al ili neforgeseblan rememoron, tamen ne eviteblas, ke ili, spertante penigan vojaĝon, faris observadon ne tiom profundan nek tiom ampleksan al iuj partoj de la Silka Vojo, kio sendube lasis al ili grandan bedaŭron... Ĉe adiaŭo al la Silka Vojo niaj raportistoj ankoraŭ havas multon por diri al niaj legantoj.

La Red.

Zheng Zhenjie:

SOPIRO AL ĜIA STARTPUNKTO


Mi estas unu el la EPC-raportistoj, kiuj la unuaj vojaĝis laŭ la Silka Vojo. Atinginte Xi'an, startpunkton de la Silka Vojo, mi tuj estis kaptita de la antikva kultura etoso, kiu troveblas ĉie, en delikataj silkaj restaĵoj en muzeo, en antikvaj libroj, en kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj porcelanaĵoj konservataj de lokanoj kaj eĉ en dialekto iom kruda je la unua aŭdo...

Certe, Xi'an famas pro sia antikveco. Kaj Lantian-homoj vivantaj

antaŭ miliono da jaroj kaj Banpohomoj antaŭ sesmil jaroj ĉiuj lasis tie siajn vivo-signon kaj saĝo-ateston. Post ili, 13 ĉinaj dinastioj prenis ĝin kiel ĉefurbon, pro kio Xi'an abundas je antikvaj maŭzoleoj. Kaj hazarde oni eltrovis tie multajn arkeologiajn trezorojn: Fosante puton, kamparanoj malkovris argilajn soldatojn kaj ĉevalojn de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (246-209 a.K.); konstruante aŭtovojon, oni elterigis 40 mil argilajn soldatojn kaj ĉevalojn de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.); riparante budhisman pagodon de la templo Famen, oni malkovris sekre-

tan palacon subteran, en kiu kon-serviĝis restaĵo de du fingroj de Ŝakjamunio kaj miloj da trezoroj de sep imperiestroj de Tang-dinastio (618-907) omaĝe al la Budho... La maŭzoleoj de dekoj da imperiestroj kaj tiuj de kvarmil altrangaj ŝtatoficistoj kaj oficiroj ankoraŭ ne estas prifositaj. Se oni prifosos la maŭzoleon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj la komunan maŭzoleon de imperiestro Li Zhi de Tang-dinastio kaj lia edzino Wu Zetian, la unua ĉina imperiestrino, tio certe faros grandan sensacion.

Iu alilanda turista, kiu bone konas Ĉinion, diris: "Por koni la



1. Pang Naiying ĉe la piedo de Flamo-monto
2. Juguraj junuloj prezentas vinon al EPC-raportisto.
3. Liu Sigong manpremas kun pakistana soldato ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Pakistano je 5 100 m super la marnivelo
4. Liu Sigong (la unua de maldekstre) kaj Li Liang (la dua de maldekstre) en taĝika familio
5. Han Hong en Wuwei, Gansu-provinco





dekjaran Ĉinion, vizitu Shenzhen; por koni la centjar2an, vizitu Ŝanhajon; por koni la miljaran, vizitu Pekinon; kaj por koni la dekmiljaran, vizitu Xi'an."

Mi deziras, ke iutage mi denove vizitu la startpunkton de la Silka Vojo kune kun niaj legantoj.

Han Hong:

SPERTO EN LA VOJAĜO

Foje, antaŭ ol mi forveturis, mia patrino malsaniĝis, sed ŝi ne postulis, ke mi restu ĉe ŝi, do kun maltrankvilo mi iris sur la Silkan Vojon. Dum tiuj tri jaroj mi fojerefoje vojaĝis laŭ la Silka Vojo, sed ĉiufoje kun koro premata, ĉar mi timis, ke mi ne povos fari bonajn fotojn. Jes, mi iam estis turmentata de malsukceso, ekz., mi ne bone fotis la grandan budhostatuon en Zhangye kaj ne havis alian ŝancon ĝin foti. Mi volis plori, ĉar pro tio mi devis peti pardonon de la legantoj kaj mia patrino. Tamen mia penado estis rekompencita per sukceso: la foto pri kamparana korto plena de ruĝaj kapsikoj sur la kovrilo de EPĈ, n-ro 10, 1996, estis premiita, kio ege ĝojigis min kaj kuraĝigis min daŭre vojaĝi laŭ la Silka Vojo. Poste mi veturis al suda Xinjiang. Tie la verda vinberovaloj kaj subtera kanalo ligita kun putoj multe inspiris kaj emociis min.

Fakte, mi multe spertis dum mia vojaĝo laŭ la Silka Vojo. La terura frosto ĉe Wushao-monto kaj varmego ĉe Flamo-monto estas neforgeseblaj por mi. Veturante tra la Koridora Regiono Okcidente de la Flava Rivero, nia aŭto paneis. Ni uzis du horojn por ĝin ripari. Poste, dum la tuta tago ĝi serioze balanciĝis sur malglata vojo kaj ĝin atakis sufoka flava polvo. Ambaŭflanke de la vojo troviĝis neniur restoracio. Tiutage mi multe suferis malsaton kaj soifon.

En la gubernio Ejne, kiam mi fotis la ruinon de la urbo Heicheng (Heicheng signifas nigran urbon), subite leviĝis "nigra ventego". Tiu sabloŝtormo estis tiel furioza, ke ĝi povus forporti homojn kaj bestojn en palpebruma daŭro. Je leviĝo de la ventego mi vidis sablo-

monton moviĝi sur la ruino. Kiam mi enaŭtiĝis, nia sperta ŝoforo tuj forveturigis la aŭton el la katastrofa zono. Poste li diris al ni ankoraŭ kun timo, ke oni ne scias, kial leviĝas nigra ventego en la urbo Heicheng ĉiufoje, kiam tien venas homoj. La regno Heishui, kiu prosperis en nordokcidenta Ĉinio, ja estis forglutita de nigra ventego dum unu nokto.

Sur la revena vojo de Turpan al Urumqi mi iris kun koro facila kaj gaja, ĉar mi jam finis la laboron. Subite mi ekpensis, ke tiu tago estas mia naskiĝtago, sed ĝi estis forgesita unufoje sur Qilian-montaro kaj alifoje en Mogao-ŝtonkavernaro. Je tio mia kolego Pang tuj donis al mi botelon da minerala akvo kaj unu rostitan kukon. Ŝi humure diris: "Jen vino kaj festorto. Gajan naskiĝtagon al vi!"

Liu Sigong:

NEFORGESEBLAJ POPLOJ

Veturante tra la dezerto Taklimakan por viziti ĝian petrolurbon, mi vidis poplojn (*Popular diversifolia*). Sub la ĉielo lazura ili firme staras unuope aŭ arope, kun granda vivipovo en "maro de morto".

Kiel fotisto, mi vojaĝis preskaŭ en ĉiuj partoj de Ĉinio kaj vidis diversajn arbojn, sed neniun el ili tiel profunde impresas min kiel tiuj poploj. Lokanoj diris al mi, ke ili apartenas al la plej antikva specio de poploj. En Xinjiang oni elterigis iliajn fosiliojn kun historio de pli ol 65 milionoj da jaroj. En dezerto ili povas vivi, ĉar ju pli ili kreskas sur alkala kaj seka sablatero, des pli ili radikas profunde sub la tero. Per siaj dika trunko, densaj branĉoj kaj folioj ili ŝirmas la teron kontraŭ sablovento. Sed bedaŭrinde, nun tie kreskas multaj poplaroj. Laŭdire ili estas raraj en la mondo.

Oni diris, ke poploj povas vivi mil jarojn, ne falas mil jarojn post la morto kaj ne putras mil jarojn post la falo. Nun en Taklimakan obstine vivas poploj en koridoro je pli ol cent km. longa. Ili servas kiel ŝirmilo en "maro de morto". Antikve, komercistoj vojaĝantaj laŭ

la Silka Vojo pasis tra la poplaro, kiu ŝirmis ilin kontraŭ varmo kaj sabloŝtormo. Laciĝinte, ili ripozis, sin apogante sur trunkoj de poploj; malsatiĝinte, ili bruligis poplan lignon por rosti viandon; kaj krome ili ankaŭ manĝigis siajn kamelojn per poplaj folioj...

Rigardante tiujn poplojn, mi kun emocio levis la fotoaparaton.

Li Liang:

RIDETO DE TAĜIKOJ

En Taxkorgan min profunde impresis la rideto de taĝikoj pli ol tieaj historiaj restaĵoj kaj naturaj pejzaĝoj.

Mi ne troige diras, ke vi povas amikiĝi kun iu ajn taĝiko en kelkaj minutoj, se vi estas sincera al li. En Tiznafu, kiam mi volis foti pejzaĝojn, mi hazarde kaptis per mia fotoaparato aron da elementlernejanoj kun librosako sur la dorso. Ŝajnis, ke ili jam rimarkis min. Returniĝinte, ili, kun sincera rideto, staris antaŭ mi en vico. Mi ĝoje fotis ilin. Sed, kiam mi celis per mia fotoaparato antikvajn loĝdomojn en malproksimo, ili revenis antaŭ mian fotoaparaton kaj denove staris en vico kaj kun rideto sur la vizaĝo. Senhezite mi fotadis ilin. Poste mi svingis al ili la manon kaj ili gaje foriris. Kaj tiam mi ekŝatis tiun nacion. En la sekvantaj tagoj en Taxkorgan tia rideto ĉiam vidiĝis sur la vizaĝo de ĉiuj aliaj taĝikoj, kiujn mi renkontis. Tiu malgranda urbo estas neriĉa, sed havas plej sinceran rideton de la homaro.

Taĝikoj pensigis min pri la Silka Vojo plena de amikeco, pri loka fotisto Heng Yaping kaj lia Xinjiang-a Aviada Kompanio. Dank' al ilia helpo, ni sukcese finis nian vojaĝon laŭ la Silka Vojo en Ĉinio.

Pang Naiying:

LA SILKA VOJO ETENDIĜANTA

Post vojaĝo laŭ la Silka Vojo mi ofte vizitas la matenan bazaron najbare de mia hejmo. Ŝajnas al mi, ke ĝi tre similas al bazaro en Kashi.



Tagmanĝo sur la Silka Vojo

En nia bazaro movoplena vendiĝas ĉio. Tie troviĝas ankaŭ budoj de kotonaj ŝtofoj.

Fakte, ĉinoj ekportis vestojn el kotona teksaĵo antaŭ malpli ol mil jaroj. Antaŭ tio, ili faris vestojn el silko, lano kaj lino. Dank' al la Silka Vojo, oni eksportis silkon de Ĉinio al la Okcidento kaj importis en Ĉinion kotonon kaj kotonan teksaĵon de Centra Azio. Interese, siatempe okcidentanoj supozis laŭ

kulturado de kotono, ke silko kreskas sur arbo aŭ sur la tĕro; kaj ĉinoj opiniis laŭ produktado de silko, ke kotono venas de delikataj fadejoj el kokono de ia frukto. Trovante, ke kulturado de kotono estas multe pli facila ol tiu de morusarboj kaj bredado de silkraŭpoj, ili rapide ellernis kaj disvastigis kotonkulturadon kaj kotonteksadon. Hodiaŭ Xinjiang estas la plej granda kotonkultura bazo de Ĉinio. La

prestinkturado de kotonteksaĵo de Kashi okupas la unuan lokon en la loka tradicia metiindustrio. Mi ŝatas kotonteksaĵon kun presitaj floraĵoj produktitan en Kashi, ĉar ĝi distingiĝas per aparta nacia koloro.

Mi ne atendis, ke tia ŝtofo troviĝas ankaŭ en la matena bazaro de Pekino. Maljuna vendisto diris al mi, ke li vojaĝis al Kantono en suda Ĉinio kaj

Xinjiang en okcidenta Ĉinio. Li vojaĝis tien, kie produktiĝas bonkvalita kaj bela ŝtofo. Li iam aĉetis Lopnur-linon, el kiu Lopnur-anoj faris vestojn siatempe. Menciante la Silkan Vojon, li diris, ke ĝi ne havas finon, ĝi etendiĝas pli foren kaj por faciligi la vojaĝon oni uzas trajnon kaj aviadilon. La maljunulo fieris, ke multaj el liaj klientoj estas raportistoj de televida stacio, instruistoj kaj studentoj de artaj institutoj. Iu knabino, kiu estis preta lerni en Svislando, aĉetis de li pecojn da ŝtofo teksita el kotono kaj lino kiel donacon por sia alilanda instruisto. Reveninte Pekinon, ŝi denove vizitis la bazaron, kun alilandaj studentoj lernantaj en Ĉinio.

Mi pensas en mi, ke en la mondo eble estas tre malmultaj, kiuj neniam portis veston el silko aŭ kotona teksaĵo. La maljunulo pravas: la Silka Vojo etendiĝas, branĉiĝas kaj kondukas al ĉiuj partoj de la mondo. ■



Pang Naiying (maldekstre) en ŝafleda boato sur Mohe-rivero



Liu Sigong intervjuanta paŝtiston ĉe la lago Sayram




Pang Naiying intervjuanta kamparonon en lia hejmo



Zheng Zhenjie (maldekstre) en Xi'an



Pang Naiying ĉe subtera kanalo
ligita kun putoj



Han Hong rajdas sur kamelo por sperti vojaĝon de
an antikva komercisto laŭ la Silka Vojo.

Fuzhou — 2200-jara urbo

de SU MIN kaj LU JIANG

FUZHOU estas ĉefurbo de Fujian-provinco ĉe sudorienta marbordo de Ĉinio. Oriente de ĝi estas Taiwan-markolo. Minjiang-rivero fluas tra la urbo kaj eniras la Orientan Ĉinan Maron.

Fama pro siaj historiaj objektoj, Fuzhou estas turisma loko. Tie naskiĝis kaj eterne ripozas nacia heroo Lin Zexu (1785-1850, politikisto en Qing-dinastio, kiu konfiskis kaj forbruligis opion de okcidentaj komercistaĉoj. Poste okazis la Opia Milito). Tamburo-monto havas multajn vidindaĵojn, kiaj grandioza antikva templo, Lingyuan-kaverno, surskriboj de antikvaj intelektuloj. La Okcidenta Lago de Fuzhou ĉarmas kiel la fama Okcidenta Lago en Hangzhou. En maro ĉe Fuzhou staras efloriska granito simila al giganta Budho. Tie kuŝas an-

Antikva lanterna pagodo en Fuzhou



kaŭ termika fonto. Famaj estas ĝiaj tradiciaj metiartaĵoj, kiaj lak-metiartaĵoj kaj skulptaĵoj el ŝtono de Shoushan-monto. Min-pladoj kun la Fuzhou-aj kiel reprezentanto estas unu el la 8 famaj specoj de ĉinaj pladoj.

Min-pladoj estas nomataj ankaŭ tiuj de Fujian, ĉar antaŭ pli ol 2 000 jaroj, la lokanoj estis nomataj Minyue. Do la lokon oni nomas Min aŭ Minyue. Tiam Fujian estis virga kaj sovaĝa kompare kun la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero, tamen la nordo de Fujian estis pli frue ekspluatita. Antaŭ 3 000 jaroj, Fujian eniris la epokon de la bronzo same kiel la centra regiono de Ĉinio. En la periodo Militantaj Regnoj (475 a.K. — 221 a.K.), la kulturo de la centra regiono kaj la regnoj Wu kaj Yue (nunaj Jiangsu- kaj Zhejiang-provincoj) enkondukiĝis en Minyue. En 202 a.K. la unua imperiestro de Han-dinastio nomumis Wuzhu regnestro de Minyue kaj fondis ĝian ĉefurbon en Ye (nuna Yeshan-monto en Fuzhou). Tio markis naskiĝon de la urbo Fuzhou antaŭ 2 200 jaroj.

La urbo Ye konstruiĝis ĉe la monto. Ĝi estis kvadrata kaj malgranda kun pordoj en la oriento, okcidento kaj sudo. En la urbo loĝis ĉefe reĝa familio, oficistoj kaj soldatoj. Ĝi famiĝis pro sia fand-entrepreno. Ĉirkaŭ la 4-a kaj 5-a jarcentoj, okazis militoj en la centra Ĉinio, tamen en Minyue regis paco. Multaj homoj transloĝiĝis tien por terkulturado, tio intimigis la kulturon de Minyue al tiu de aliaj lokoj. Rapide evoluis la socio kaj ekonomio, kaj pligrandiĝis la urbaj kvartaloj. En la 8-a jarcento oni ekuzis la nomon Fuzhou anstataŭ Ye, kiu ampleksis ankaŭ ĉirkaŭajn tri belajn montojn. Tiel Fuzhou ekhavis la trajton “urbo en la montoj, montoj en la urbo”.

Meze de la 11-a jarcento, por batali kontraŭ trosekeco kaj inundo, Fuzhou-anoj multe plantis banjanojn. Post 20 jaroj tie ĉie verdiĝis kaj Fuzhou ricevis la nomon “urbo de banjanoj”. Ĉiufoje, post pligrandigo de la urbo, oni konstruis novan ĉirkaŭfosajon. Post la dinastioj Tang (618-907) kaj Song (960-1279), tiuj fosajoj kaj Minjiang-rivero interligiĝis, kaj Fuzhou ektrovis sin en la sino de kanaloj kaj riveroj. En la 13-a jc. pro prosperiĝo de mara transportado kaj komercado, la urbo etend-



Parto de Fuzhou

iĝis suden. En 1302 oni konstruis la unuan ponton super Minjiang-rivero. La ŝtona ponto kun bele gravuritaj balustradoj longas 570 metrojn. Itala vojaĝisto Marko Polo en sia noto priskribis la belecon kaj riĉecon de Fuzhou: “Fluas tra la urbo rivero, ambaŭborde de ĝi staras belaj domoj. Multaj ŝipoj portas varojn, ĉefe sukerojn. Ĉi tie estas multaj belaj ĝardenoj. Bonodoras fruktaroj.”

Dank’ al la geografia situo Fuzhou prosperiĝis kaj fariĝis grava haveno de transmara negoco post la 13-a jc. Ĉina teo eksportiĝis ĉefe tra Fuzhou. De tiam multaj Fuzhou-anoj transloĝiĝis al Taiwan, sudorienta Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Post la Opia Milito en 1840-1842, Fuzhou fariĝis unu el la kvin malfermitaj komercaj havenurboj. La urbaj kvartaloj rapide dilatiĝis laŭ Minjiang-rivero. Ĉe la suda bordo estas kvartalo de konsulejoj de 10 okcidentaj landoj. En 1866, stariĝis en Mawei, ekstera haveno de Fuzhou, Administra Buroo de Ŝiptransportado. Ĝi estis unu el la gravaj lokoj de frua teknika interŝanĝo de Ĉinio kaj la Okcidento.

En la historio Fuzhou 5-foje pligrandiĝis, malgraŭ tio en 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, la urbo havis areon de nur pli ol 10 kvadrataj kilometroj. Nun ĝi areo pli ol mil kvadratajn kilometrojn (la urbaj kvartaloj kovras 100 kvadratajn

kilometrojn), kie vivas pli ol miliono da loĝantoj.

Komence de la 80-aj jaroj, en Fuzhou ne estis altaj domoj. Multaj loĝis en lignaj dometoj. En frosta Printempa Festo (la ĉina novjara tago), oni gluis paperon sur la lignaj muroj kun multaj fendoj por teni la temperaturon. Tial oni ŝercis — “Fuzhou, papera urbo”. En 1984, Fuzhou fariĝis unu el la unuaj malfermitaj urboj ĉemaraj en Ĉinio. Dank’ al la ekspluatado kaj konstruado ĝia fizionomio multe ŝanĝiĝis.

Pri eksterlanda investo Fuzhou havas avantaĝon — eksterlande loĝas 2.5 milionoj da Fuzhou-anoj, inter kiuj ne mankas riĉaj komercistoj. Pro nostalgio ili multe investis tieajn entreprenojn. Nun tie ĉiujare okazas Internacia Monato por inviti investantojn al kelkaj gravaj projektoj, kiaj reformado de malnovaj urbaj kvartaloj kaj entreprenoj, konstruo de bazaj instalaĵoj. Centoj da oldaj loĝkvartaloj estis renovigitaj, konstruiĝis loĝdomoj por kelkcent miloj da homoj kaj dekelkaj ŝoseoj, stariĝis ĉ. cent

domegoj, super Minjiang-rivero aperis kvar pontoj. La urbaj trafiko kaj telekomunikado multe pliboniĝas.

Mawei nun estas unu el la distriktoj de Fuzhou. En 1884 tie okazis mara milito inter Ĉinio kaj Francio. Antaŭ dekelkaj jaroj, tie estis dezertaj plaĝoj kaj marĉo. En 1985, Mawei fariĝis ekspluata distrikto de ekonomio kaj tekniko. Nun Mawei-haveno ligiĝas kun la tuta mondo. Ĝi estas ne nur ŝtatnivela ekspluata distrikto, sed ankaŭ investejo de komercistoj el Taiwan, alt-teknika ĝardeno kaj senimpostejo. La ekonomia evoluo de Fuzhou multe dependas de Mawei. En Fuzhou la similaj ekspluatataj distriktoj estas dekelkaj, al kiuj investis komercistoj el pli ol 50 landoj kaj regionoj. Laŭ kontrakto ili devas investi sume 13.1 miliardojn da usonaj dolaroj. Nun 2 500 entreprenoj jam ekfunkciis. Formiĝas la ekonomia zono ĉe enmariĝo de Minjiang-rivero, kaj Fuzhou enviciĝis en la rapide evoluantaj lokoj de eksterakomerca ekonomio.

En modernigo de la urbo, la loka registaro dediĉas grandan atenton al la urba konstruo en la tuto, distrikta administrado, protektado de antikvaj stratoj, ĝardenoj kaj loĝdomoj. Oni jam konstruis dekojn da parkoj. En la estonteco Fuzhou estos ĝardeneska, havena kaj komerca urbo. ■

Kia estas via nomo, virinoj?

‘DELIKATECO, via nomo estas virino!” Tiuj vortoj de Ŝekspiro (1564-1616) estas bone konataj en Ĉinio. Sed, oni ne scias, kiam ekfuroris en Ĉinio la vorto “kapablulino” destinita por priskribi la virinojn spritajn, talentajn kaj sukcesajn en la kariero. Sed bone koninte ilin, mi trovis, ke ili, same kiel ordinaraj virinoj, havis siajn ĝojojn kaj malĝojojn en la vivo.

Li Xiaojing (Li Ŝjaŭĝing) kun vizaĝo de juna knabino kaj naiva mieno estas gaja kaj milda. Laŭ ŝia aspekto, eble neniu kredis, ke ŝi ludas gravan rolon en la konstru-materiala rondo de Pekino. Dank’ al ŝi, en Pekino aperis komerca strato de konstruaj materialoj.

Li Xiaojing konfesis, ke ĉe sia debuto en la komerca rondo, ŝi estis tiel nesperta, ke ŝi jam elspezis sian tutan ŝparmonon (10 mil juanoj) sen subskribi kontrakton. El tio rezultis, ke oni ordonis al ŝi malinstali la budon en difinita tempo. Foje-refoje ŝi transportis la varojn al sia loĝejo. Vidante, ke ŝia juna filino gaje ludas inter amasoj da cemento kaj aliaj konstru-materialoj, ŝi dronis en tristo.

Antaŭ ol finiĝis la konstruado de komerca domo ĉe strato, ŝi ja prunteprenis 50 mil juanojn kaj antaŭpagis la sumon por ĝin lui. Laŭ kontrakto, unu jaron poste ŝi devis kvitiĝi kun la



Gao Yingwei (dekstre) en kunveno de entreprenistinoj

luiganto je miliono da juanoj por la jaro. Tion decidinte, ŝi neniom retiriĝis, ĉar ŝi estis certa, ke pro furoriĝo de domdekoracio kaj apero de modernaj konstruaj materialoj, sendube prosperos en Pekino la merkato de konstruaj materialoj, kaj najbare de la ŝtata stablo de konstruaj materialoj, la komerca domo certe altiros al si grandan atenton de la publiko. Dank’ al siaj diligenta administrado kaj honesta servo, unu jaron poste ŝi akiris sian meritantan lokon en la komercado. Tri jarojn poste la konstru-materiala merkato floris en Pekino. Pro la bona situo ŝia komerco senĉese progresis en kruela konkurenco.

“Multaj virinoj, kiuj sukcesis en sia kariero, spertis divorcon aŭ malsukceson de la amafero,” diris Li Xiaojing kun amara rideto. Siatempe ŝi celis konstru-materialan merkaton de Pekino, sed ŝia edzo ĝin neglek-

tis, tial ili ekokupis sin pri siaj propraj aferoj kun interkonsento, ke ili instalos sian “neston” tie, kie unu el ili sukcesos la unua en sia kariero. En tiuj jaroj ili malofte kunestis pro siaj propraj aferoj. Proksimiĝis datreveno de ŝia naskiĝtago, sed ŝi ricevis nenium donacon de la edzo, nek gratulan telefonaĵon. Ŝi do telefonis al li. Ĉe la telefono ŝi ne plu funkciis kiel fiera mastrino, sed tenera edzino: “Hodiaŭ estas datreveno de mia naskiĝtago. Ĉu vi ne volas adresi al mi kelkajn mildajn vortojn por esprimi vian amon al mi?” Post longa silento aŭdiĝis finfine el la telefono liaj malvarmaj vortoj: “Pardonon, mi havas novan kunulinon.” Je tio, firmvola Li Xiaojing ploris tutnokte. La vortoj de ŝia edzo foje-refoje resonis ĉe ŝiaj oreloj. Li sentis grandan preforton vivante kune kun ŝi kaj li neniam kredis, ke ŝi estas pli kapabla kaj lerta en komercado ol li. Ŝi eksedziniĝis, sed ŝi restas ankoraŭ la sama, tiel serena kaj decidema kiel antaŭe. Sed neniu scias, ke kiam ŝi estis sola hejme, ŝi longe sidis konfuzite kaj sin demandis, por kio ŝi klopodas tuttage.

Gao Yingwei, ĝenerala direktorino de granda magazeno, kies jara profito superis cent milionojn da juanoj, estis aŭskultanta raportadon pri laborplanoj de diversaj departementoj. Kiam ŝi elmetis siajn opiniojn, ĉiuj ŝiaj

subuloj respektoplene faris noton. Multaj ŝiaj kolegoj ne atendis, ke ŝi, antaŭa vendistino, povas sukcese gvidi la magazeton al unu el la plej profito-donaj magazenoj en Pekino. Intertempe, ŝi, kiel diplomiginto el mezlernejo, atingis magistrecon de industri-komerca administrado.

Multaj ĉinoj trovis la geedzecon neekvilibra, se la edzino estas ĝenerala direktorino kaj la edzo — ordinara vendisto. Sed Gao diris, ke ŝia plej granda “rikolto” estas ŝia edzo, s-ro Jia. Kaj li ridetis: “Ĉar laŭ la tradicia koncepto ĉinoj opinias, ke viroj devas sin okupi pri eksteraj aferoj kaj virinoj — pri la hejmaj, do multaj viroj ne povas toleri, ke ilia edzino estas pli kapabla ol ili mem. Fakte, mi faras mastrumadon hejme ne por la ĝenerala direktorino, sed por mia edzino, kiu diligente laboras tuttage.” Kiam li diris tion, lia edzino silente iris al balkono por manĝigi birdojn. Antaŭe Gao ne ŝatis birdojn pro ilia bekado. Sed ŝia edzo emas bredi ilin, do, iom post iom, an-

kaŭ ŝi povas kompreni iliajn kantojn. En libera tempo ili ofte sin apogis unu al la alia kaj silente aŭskultis la birdan kantadon.

En la kompanio oni ofte forgesis, ke Zhang Shuqin estas virino, ĉar ŝiaj okuloj brilaj kaj vortoj decidemaj montras viran bravecon. Ŝi multe kontribuis al tiu telekomunika kompanio fondita de ŝi, ŝia edzo kaj iliaj amikoj. Nun en la kompanio laboras pli ol mil oficistoj kaj laboristoj. Ŝi opiniis, ke en merkato neniu aparte prizorgas virinojn. Ŝi iam instalas telekomunikajn ekipaĵojn sur montosupro en frosta vento. Ne povante plu elteni la froston, ŝi trinkis iom da alkoholaĵo; ŝi iam bicikladas en nekonata urbo por serĉi kunlaborantojn. “Mi ne timis malfacilojn nek lacegon,” ŝi diris, “la plej granda atako por mi estas, ke iuj kunlaborantoj subite retiris siajn akciojn, kio metis mian kompanion en grandan embarason, kaj ke miaj bonaj amikoj perfide altiris al si multajn miajn klientojn.” Oni ne scias, kiom da fojoj ŝi ebriiĝis por profunde dormi sen pensi pri

aferoj de la sekvanta tago.

Ŝi diris, ke post kelkvara klopodo en la komerca konkurenco, ŝi fariĝis firmvola, tamen ŝi ĉiam gardas en sia koro teneran spacon por siaj edzo kaj filo. Debutante en merkato, ŝi devis mem fari multajn aferojn, ŝi do ne havis tempon prizorgi sian filon, kiu, obeema, ofte revenis hejmen kun ŝiaj koleginoj, nomante ilin patrino. Poste, li eĉ sekvis la virinon, kiu afable traktis lin, kaj nomis ŝin patrino. Vidinte tion, Zhang estis turmentata de ĉagreno. Ŝia edzo kaj ŝi antaŭe studis en la sama universitato. Libro-studema, li retiriĝis en teknikan departementon post travivado de malfaciloj en komerca konkurenco. Vidante, ke la edzino foje-refoje sukcesis kaj malsukcesis, li ege simpatiis kun ŝi. Li diris nur, premante ŝiajn manojn: “Eĉ se estas abismo antaŭ vi, mi certe min ĵetos kune kun vi.” Ŝi diris kun emocio, ke ŝi ne povus sin teni ĝis hodiaŭ sen subteno de ŝia edzo. Finfine ŝi sukcesis, sed ŝajnis, ke ŝi ne tiel ĝojis. Rigardante tra fenestro de la aŭto, ke pasantoj libere promenas surstrate, ŝi rememoris la pasintecon: Ŝi senzorge promenis kune kun la edzo kaj filo en homa fluo...

Li Xiaojing, Gao Yingwei kaj Zhang Shuqin estas amikoj. Kelkfoje ili kuniĝis kaj babilis libere. Krom komercaj aferoj, tiuj virinoj nomataj “kapablulinoj” bezonas spacon, kie ili povas libere babili kiel ordinaraj virinoj pri hejmaj aferoj: la edzo kaj infano. Interese, tiuj virinoj ne ŝatas “delikatecon”, la vorton de Ŝekspiro, nek volas porti la nomon “kapablulino”. Ili diris, ke tiu nomo estas malagrabla, sed ili ne povas ĝuste klarigi la kialon. Ŝajnas, ke hodiaŭ oni havas malfacilon doni konvenan nomon al virinoj. ■

Li Xiaojing (dekstre) kaj ŝia filino



Urbanoj kaj iliaj profesioj

de JI PING

REFORMADO de ekonomia sistemo en Ĉinio kaŭzas diversajn ŝanĝojn en la socia vivo. Ekz. pri profesio-elekto, antaŭe oni ŝatis labori en ŝtataj institucioj kaj entreprenoj, kaj nun multaj havas novan elekton. Oni tre atentigas la enspezon kaj efektiviĝon de sia valoro.

KUMULANTOJ

Antaŭe preskaŭ neniu ĉino pensis havi du okupojn samtempe, ĉar tiam la kutimo estis diligente plenumi propran taskon. Kumulantoj aperis en la 80-aj jaroj. Ili estas fakuloj, kiuj

havas ĉefan postenon kaj liber-tempan okupon samtempe.

Inter miaj konatoj estas multaj tiaj kumulantoj. Ekz. ĉefredaktoro estas ankaŭ invitita profesoro en universitato; inĝeniero de ŝtata entrepreno estas dungita de privata fabriko kiel teknika konsilanto; universitata instruisto laboras ankaŭ kiel advokato... Ili havas alian okupon aŭ por pli multe enspezi, aŭ pro intereso pri sia fako, aŭ por helpi amikojn. Ĝenerale ili faras sian duan laboron en libera tempo. Tio levas iliajn enspezojn kaj socian pozicion. Ili povas ankaŭ pli multe kontribui al la

socio.


Fraŭlino Chen estas invitita parolistino en iu radio-stacio de Pekino. Mi renkontis ŝin, post kiam ŝi gvidis muzikan programon vespere. Ŝi diris, ke ŝi sin ligis al tiu dua okupo unue pro intereso, due por praktiki siajn fakajn sciojn. Ŝi studis muzikon en universitato. Diplomiĝinte, ŝi eklaboris en elementa lernejo kiel instruistino pri la angla lingvo. Ŝi ŝatas instruadon, kaj instruistoj havas sufiĉe da libertempo, ekz. someraj kaj vintraj ferioj, do ŝi ne havas intencojn tuj forlasi la laboron en la lernejo, tamen ŝi deziras labori pri muziko. Ŝia dua okupo en radio-stacio donas al ŝi eblecon prepari sin por estonta laboro.

NOVA FENOMENO

Pri elekto de posteno oni ofte diras "du-direkta elekto", kiu signifas, ke la posteno kaj persono elektas sin reciproke. Rapide ŝanĝiĝas la konceptoj pri elekto de posteno kaj laboranto. Tiel aperas nova fenomeno kaj oni havas pli da ŝanco elekti postenon.

Restoracioj kaj magazenoj kutimas dungi junajn servistinojn. Nun en multaj urboj servas ankaŭ mezaĝaj virinoj. La dungantoj opinias, ke la mezaĝaj servistinoj estas pli matu-

Forlasinte sian laboron en urbo, Sun Chaomei sin okupas pri bredado de strutoj en kamparo.



raj, diligentaj kaj fidindaj ol la junaj. En iu restoracio eĉ servas nur junuloj. La mastro intencas allogi klientojn per tia speciala maniero.

Simila fenomeno vidiĝas ankaŭ en aliaj rondoĵoj. Ekz. en sekcio de publikaj rilatoj de kompanioj, antaŭe laboris ĉefe belulinoj, nun videblas ankaŭ viroj, kiuj per siaj matureco kaj riĉaj travivaĵoj fruktodone laboras. Malmultiĝas la postenoj, kiuj postulas nur virojn aŭ virinojn.

LABORI EN KAMPARO

800 milionoj da ĉinoj loĝas en la kamparo. Pro diferenco de la ekonomiaj kondiĉoj inter la urboj kaj kamparo, multaj kamparanoj deziras havi okupon en urbo. En ĉinaj urboj laboras multe da kamparanoj. En la lastaj jaroj iuj diplomitoj de universitato kaj teknikistoj eklaboris en vilaĝaj entreprenoj. En iu fama vesto-kompanio, kiu situas for de urbo, laboras pli ol 600 universitataj diplomitoj.

Iuj urbaj senlaboruloj el ŝtataj entreprenoj eklaboras en kamparo. Ili aĉetas agrikulturilojn, ekspluatas virgan teron kaj bredas brutojn — iĝas “urbanoj en kamparo”. Kompare kun la kamparanoj, ili havas pli da kapitalo kaj pli altan kleracon kaj bone konas la merkaton. Ili multe profitas de terkulturado. Ankaŭ aliaj urbanoj iras al kamparo dum laborplena sezono.

“UNU FAMILIO, DU SISTEMOJ”

Matene, Jiang Ming estas tre okupita. En matena bazaro li aĉetas legomojn kaj revenas hejmen por prepari manĝon por siaj edzino kaj infano. Antaŭ ol iri al la oficejo, li devas akompani la infanon al la infanĝardeno. Kial ĉion faras li, sed ne la edzi-

no? Ĉar ŝi laboras en fremdlanda kompanio (en Ĉinio). Ŝi havas altan salajron kaj malmulte da libera tempo. Jiang estas ŝtata oficisto kaj havas sufiĉe da tempo.

En la nuna Ĉinio estas du sistemoj — aktiviĝas la merkata ekonomio kaj samtempe restas la planizita. Do aperas tia fenomeno: iuj familianoj, ekz. Jiang, laboras en ŝtataj institucioj aŭ entreprenoj kun fiksita salajro kaj la ŝtato pagas por iliaj kuracado kaj loĝado; aliaj familianoj, ekz. la edzino de Jiang, laboras en kompanioj, aŭ iĝis privataj entreprenistoj, kiuj havas penigan laboron, sed multan enspezon. En tia familio oni ĝuas la favoron de ambaŭ sistemoj. Multaj junaj geedzoj ŝatas tion. Jen “unu familio, du sistemoj”.

Nana vendas vestojn en bazaro. Antaŭe ŝi laboris en fabriko. Pro malalta salajro ŝi intencis eliri. Ŝia edzo, laboranto de ŝtata entrepreno, demandis: “Se vi malsaniĝos, kiu pagos por via kuracado?”

Tiam Nana pensis, ke certe iam la ŝtato ne plu pagos por la kuracado kaj loĝado de laboristoj, kaj estas pli bone, ke ŝi frue trovos alian okupon. Post longa cerbumado ŝi eklaboris kiel privata vendistino. Ŝi sukcesis — la familio multe enspezas, ŝi havas nedifinitajn laborhorojn, ŝia edzo tre kontentas, kaj ŝiaj antaŭaj kolegoj tre envias ŝin.

Geedzoj Jiang antaŭe estas ŝtatoficistoj. La edzino posedas la anglan lingvon kaj fakajn sci-ojn, tial ŝi trovis alian okupon. Nun ŝi enspezas 4-5-oble pli multe ol Jiang.

Tio estas nur momenta fenomeno. En reformado ofte aperas io nova. Pasintjare multaj eliris el ŝtataj institucioj kaj entreprenoj, kaj ĉi-jare multaj revenas. ■

ĈINAJ POPOLAJ RAKONTOJ

ALFLUGINTA MONTO



ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Ĉinaj popolaj rakontoj

En la pasintaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis 8 libretojn de ĉinaj popolaj rakontoj, kaj en junio aperis la naŭa.

Monteto ekflugos kaj falos sur iun vilaĝon. Tion antaŭsciis “freneza” bonzo. Li avertis la vilaĝanojn pri la danĝero, sed neniu kredis lin. Kion li faris por savi la vilaĝon? Vi trovos solvon en la rakonto “Alfluginta monto”.

Malriĉa fraŭlo trovis en sia kampo helikon kaj breidis ĝin en akvovazo en sia kuirejo. Kaj de tiam li ekhavis tagmanĝon pretan en sinsekvaj tagoj. Kiu kaŝe helpis lin? La rakonto “Heliko-knabino” diros al vi, ke tion faris knabino el la heliko.

Baleno havas truon sur sia kapo, tra kiu ĝi de tempo al tempo elŝprucigas akvon. Kiam kaj kiel ĝi ekhavis la truon?

...
Havu kaj legu la rakontojn, kaj kredeble ili interesos vin.

Formato: 11x18 cm.

Distribuata de la Distribua Fako de “El Popola Ĉinio”
Prezo: 4.00 USD.

Sendokosto: 1.00 USD.

EVENKOJ KAJ BOACOJ

de LIU XIAOCHUN

EVENKOJ loĝas ĉefe en nordorienta Ĉinio, kie estas la Granda kaj Malgranda Xing'an-montaroj kaj vasta stepo. Laŭ kalkulo en 1990, en Ĉinio estas ĉ. 26 mil evenkoj el tri branĉoj: la unua okupas sin pri terkulturado, la dua bredas brutojn en Hailar de Interna Mongolio, kaj la tria vivas en Aoluguya en Hulun Boir. Oni nomas ilin "evenkoj de Aoluguya". Ili vivtenas sin per bredado de boacoj. Ĉiu, kiu vizitis Aoluguya,

diras, ke ĝi estas sankta pitoreskejo kun verdaj montoj kaj klara rivero. Ĝi situas ĉe la norda piedo de la Granda Xing'an-montaro kaj ĉe la rivero Jiliu, branĉo de Ergune.

Antaŭe tieaj evenkoj sin okupis pri ĉasado. Boacoj multe helpis ilin en ĉasado kaj transportado.

Iom post iom evenkoj iĝis tre lertaj en bredado de boacoj. Boaco estis sovaĝa cervo ĉe Bajkalo. Ĝi estas milda kaj ne

timas homojn. Ĝi lerte kuras en arbaro, marĉo kaj sovaĝa kampo kaj ŝatas kontakti homojn. Tiam evenkoj ĉasis ĝin por manĝi. Estas popolrakonto: 8 ĉasistoj kaptis 6 boacidojn sur monto. Iliaj edzinoj kaj infanoj tre ŝatis tiujn bestetojn kaj bredis ilin hejme. Poste oni trovis, ke boacoj lertas en transportado, kaj komencis dresi ilin. Oni metis sonorilon sur la kolon de boaco, do ĝi "oficiale" eniris la vivon de evenkoj. Popolkanto

Boaco kun sia mastro



priskribas la vivon de evenkoj:

*Tendaro en arbaro,
kiel ondoj en maro,
ĉashundo bojas ĉe la pordo,
al fremduloj henas ĉevalo.
El la poto viandodoro dis-
portigâs,
feloj vulpa, linka, kapreola
pendas,
dresita cervo remaças kuŝante,
en la tendaro infanoj petole
ĝojiĝas.*

La “dresita cervo” en la kanto estas ĝuste boaco, kiu alportis ĝojon al la evenkoj.

La boaca korno similas al tiu de cervo, kapo al tiu de ĉevalo, korpo al tiu de azeno kaj piedoj al tiuj de bovo. Tial oni nomas boacon ankaŭ “monstro”. Ĝi altas unu metron, longas du metrojn, ne timas froston kaj ŝatas manĝi muskon. Somere ĝi manĝas ankaŭ fungojn kaj foliojn. Ĝenerale ĝi ne bezonas prizorgon kaj bredadon. Nokte oni povas lasi ĝin serĉi manĝaĵon en monto, kaj ĉe tagiĝo ĝi mem revenas dormi. Ĝiaj grandaj piedoj tre taŭgas por longe marŝi en marĉo, neĝkampo kaj arbaro. En homa transloĝiĝo ĝi transportas pezaĵojn kaj postulas nur iom da salo. Ĝia vivo daŭras ĉ. 20 jarojn. Ĉiujare la boacino naskas unu idon, iafaĵe du. Ĝia lakto estas trinkebla por homoj. Oni faras veston kaj ŝuojn el ĝia led. Evenkoj bredas boacon ĉefe por ricevi ĝiajn kornojn, kiuj estas tre valora materialo de medikamento. Ne nur la masklaj, sed ankaŭ la femalaj boacoj havas kornojn, kiuj donas profiton al evenkoj.

Evenkoj tre ŝatas boacon kaj malofte mortigas ĝin. Ili aparte prizorgas la gravedajn kaj junajn boacojn — ne lasi ilin porti pezaĵon; ne trinkiĝi ŝvitantan boacino, por ke ĝi ne abortu kaj malsaniĝu; ne karesi la boac-

idon dum ĝia mamsuĉa periodo, alie ĝia patrino ne akceptos ĝin; ne bruligi putran lignon, betulan ŝelon kaj pinan lignon, ĉar tio venenos la boacidon. Evenkoj neniam pelas boacon per bastono aŭ vipo. Ili eĉ donas nomon al ĉiu boaco, kaj tiu tuj venos post voko kaj povas longtempe memori sian nomon. 216 boacoj de Aoluguya estis donacitaj al zooj de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj urboj. Foje iu evenkino vidis boacon bredatan de ŝi antaŭ tri jaroj, ŝi vokis ĝian nomon, kaj ĝi tuj kuris al ŝi, etendis sian kapon ekster la barilon kaj blekis.

En Aoluguya, brede boacojn estas familia entrepreno. Ĉiu familio havas 20-30 aŭ 300-400 boacojn kaj la nombro montras riĉecon de la familio. En ĉiu grupo da boacoj estas unu “dia boaco”, tute blanka, dum multaj ceteraj estas nigraj aŭ mikskoloraj. Tia blanka boaco estas tre rara. Laŭ evenkoj, “dia boaco” alportas feliĉon kaj pacon. Ili ne rajdas sur ĝi, ne ŝarĝas ĝin kaj okazigas solenan funebran ceremonion tuj post ĝia morto — trovi en arbaro kvadraton kun po unu arbo ĉe la kvar randoj, el branĉoj fari platan liton, meti sur ĝin la boacon, kovri ĝin per folioj, por ke ĝi poste sekiĝu.

Laŭ evenkoj, morto de la “dia boaco” aŭguras dekadencan de la familio; nur kiam naskiĝos nova “dia boaco”, la familio prosperiĝos. Por protekti la boacojn kontraŭ lupoj kaj epidemio, evenkoj kultas urso-dion kaj Along-dion same kiel iliaj prapatroj. La idolo de urso-dio konsistas el feloj de maskla kaj femala ursidoj. Evenkoj opinias, ke urso-dio protektas la boacojn, kaj se estas urso-dio, lupoj ne kuraĝas veni. Nun lupoj malmultiĝas, do oni malmulte kultas urso-dion. La idolo de Along-dio estas kurba bastono simila

al ringo. Oni metas ĝin sur la kolon de malsana boaco kaj demetas ĝin nur kiam la boaco resaniĝas.

En la lastaj jaroj, pro kontaktoj kun la ekstera mondo, evenkoj multe lernis de moderna civilizacio. Post multaj provoj ili reformis bredadon de boacoj. Ili konstruis stalon kaj nutras boacojn per folioj de betulo kaj preparita manĝaĵo anstataŭ musko kaj fungo. Por eviti degeneron kaj plibonigi la kvaliton de la boaco-raso, ili planas importi boacojn kaj fridigitan boacan spermon el Rusio. Kunlaboro kun aliaj provincoj, Aoluguya starigis entreprenon, kiu prilaboras medikamenton el juna boac-korno. Tio donas profiton al la evenkoj, kiuj antaŭe ne sciis prilabori ĝin.

En ekonomia progreso evenkoj samtempe bone protektas la medion. Post bredado de boacoj ie en iom da tempo, ili serĉas alian lokon por protekti la naturan medion. Kun tia koncepto evenkoj harmonie vivas kun la naturo. La afablaj kaj diligentaj evenkoj komprenas, ke ili ne disigeblas de Aoluguya kaj boacoj. Ili scias ankaŭ, ke la boacoj ne disigeblas de ili. ■

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio “Esperanto-Maró” volas kunlabori kun ĉiuj E-organizo kaj esperantistoj pri komerca traktado, varoperado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso: Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, Hangzhou CN-310009, Zhejiang, Ĉinio

Telefono: +86-571-7071705

Telefakso: +86-571-7035995

LA NAŜIA ORKESTRO DE ANTIKVA MUZIKO EN YUNNAN

Eble tio estas orkestro kun muzikistoj plej aĝaj en la mondo. Inter ili sep aĝas pli ol 80 jarojn, el kiuj la plej aĝa muzikisto havas 88 jarojn. Iuj el iliaj instrumentoj povas esti rigardataj kiel historiaj objektoj, ekz., 400-jaraj bivo kun torda kolo kaj sonorilo farita de Hindio. La antikva muziko de naŝioj, ludata de la orkestro, rememorigas pri la vivo antaŭ mil jaroj.



La Naŝia Orkestro de Antikva Muziko ludanta

Inter la naciminoritatoj de Ĉinio la naŝioj famas pro siaj longa historio kaj aparta kulturo. La skriblingvo Dongba, uzata de ili nuntempe, estas konata kiel plej antikva hieroglifo, alinome, viva fosilio. La antikva muziko de naŝioj, kiu kunfandiĝis kun la hana kulturo, havas gravan valoron por studi la ĉinan kulturon.

La melodio "Ok Diagramoj" estas ofte prenata kiel preludo de la orkestro. Tuj post longe tirata voĉo kaj ekfrapo de gongoj leviĝis muziko tra la halo banata de lumo kaj saturita de fumo.

Komence la melodio estis ludata, kiam taoistoj recitis sutrojn. Tamen, la melodio, ludata de la orkestro, karakteriziĝas ne nur per seriozeco kaj mistikeco de la muziko por sutro-recitado far taoistoj, sed ankaŭ per elegantecco de kortega muziko. Kaj samtempe, ĝi elspiras guston de naŝia popolkanto kaj muziko de Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.). En la antikveco ci-o, formo de la ĉina klasika poezio, estis kantebla. Sed nun oni scias ne pli ol ĝiajn tekston kaj melodi-

an titolon. Kiel ĝin kanti, oni jam ne scias, ĉar ĝiaj muziknotoj plejparte perdiĝis antaŭ tre longe. Feliĉe, oni trovis ĝian muzikon de Tang-dinastio (618-907) en la antikva naŝia ludado. Laŭ la melodio naŝiaj knabinoj kantis agrable la koncernan tekston.

La antikva naŝia muziko originis en Tang-dinastio. Ankoraŭ necesas fari esploradon, kiamaniere ĝi herediĝis ĝis nun. Multaj junuloj de la naŝia nacio ŝatas ĝin, kio akcelas ĝian disvolviĝon. Kaj la orkestro kulturas ilin por daŭigi sian aferon.

HEZE, PRODUKTEJO DE PEONIOJ

Peonio, fama tradicia floro de Ĉinio, estas granda, bela, freŝkolora kaj bonodora. Ĝi portas la nomon Reĝo de Floroj. Heze de Shandong, Ĉinio, estas konata kiel produkitejo de peonioj.

En la loko kreskas pli ol 100 mil peonioj kun almenaŭ 300 varioj kaj koloroj ruĝa, flava, blua, blanka, nigra, verda, ruĝeta kaj purpura. Jam en 1522-1567 tieaj peonioj, kiel tributo, ornamis la ĝardenojn de la imperiestra familio en Pekino. En la lastaj jaroj oni kreskigis peoniojn de Heze ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj, kiaj Japanio, Kanado kaj Usono.

Estas dekoj da famaj varioj de peonioj en Heze. Nigra peonio, kun multobla petalo kaj iom da purpuro, famas pro siaj verdaj stameno kaj pistilo. El la ruĝaj peonioj estas rara vario kun palruĝa kaj karmezina floroj. Troviĝas ankaŭ la peonio, kiu havas petalojn palruĝajn kaj karmezinajn. Kaj verda peonio famas pro sia kolorvario: ĉe burĝonado freŝa verdo, ĉe disvolviĝado duona verdo miksitaj kun ruĝo kaj ĉe velkado neĝblanko.

La tieaj florkultivistoj lernas en reguligado de temperaturo kaj humideco kaj moderigo de sunlumo kaj aero. Pro tio tie la peonioj floras en la kvar sezonoj.

RIPOZEJO DE BIRDOJ

De oktobro ĝis marto estas ora tempo rigardi birdojn en la Naturparko de Poyang-lago.

Poyang-lago kuŝas en la malsupra baseno de Yangzi-rivero. Ĝi areo 3 283.4 kvadratajn kilometrojn en la pluva se-

zono. Kaj la naturparko kovras 22.4 mil hektarojn. Ĉiujare, ĉe la fino de oktobro, malprofundiĝas la okcidenta parto de la lago kaj abundas en ĝi herboj, fiŝoj kaj salikokoj, tiel ke milionoj da birdoj kun 306 specoj el la Interna Mongolio kaj Siberio flugas tien por travintri. Inter ili estas blanka, blankverta kaj ruĝverta grupoj, merganaso, blanka cikonio kaj aliaj kvinspecaj birdoj unuarange protektataj de Ĉinio. En la naturparko 13 specoj de birdoj estas enlistigitaj de la Internacia Ornitologia Organizaĵo kiel birdoj pereontaj.

En ĝi vivas proks. 3 000 blankaj grupoj, kiuj konsistigas pli ol 98% de tiuj de la mondo. Ili havas historion de 60 milionoj da jaroj kaj ĝuas la nomon viva fosilio sur la tero. Hinda ornitologo diris: "La plej belaj el la birdoj de la mondo estas blankaj grupoj. Ili havas lilie gracion kaj okulplaĉan konturon. Tamen, tiuj birdoj, kiuj vivis dekojn da milionoj da jaroj sur la tero, alproksimiĝas al pereoj." En 1980 la Internacia Fonduso de Gruoj anoncis, ke en la mondo vivas nur 320 blankaj grupoj. Sed, januare de 1985 oni trovis kun granda miro, ke super Poyanglago ŝvebas miloj da blankaj grupoj.

Nun la Naturparko de Poyanglago servas ne nur kiel sidejo de la Internacia Esplorcentro de Marĉoj kaj Gruoj, sed an-

kaŭ kiel turisma loko. Tie plej atentoaltira programo estas rigardi birdojn. Kiam vi, starante en la rigardejo alta kiel oketaĝa domo, teleskope rigardas ĉirkaŭen, vi trovos, ke en la serena ĉielo ŝvebas nuboj da blankaj grupoj grandaj kaj malgrandaj. En luna nokto tie bekas multaj birdoj. Inter ili plej sonore bekas la blankaj grupoj.

VEKTOPORTISTOJ EN TAISHAN

Je duono post la kvara matene ellitiĝis vektportisto Chao Jingshun kaj liaj kamaradoj. Ion manĝinte, ili komencis grimpi al la supro de Taishan-monto, kun vekto sur ŝultro. Post nelonge, ili ŝvitegis kaj demetis la jakon. Poste ili daŭrigis la grimpadon. Sur la montodeklivo la vektportistoj grim pantaj la monton formis apartan spektaklon por la turistoj.

Tiutage, kiel aliaj vektportistoj, ankaŭ Chao Jingshun vek-

toportis tegolojn por templo. La vektportistoj plejparte estas tieaj kamparanoj. Ĝenerale, ili surgrimpas la monton dufoje ĉiutage, kaj iam eĉ trifoje. Ili manĝas kvarfoje ĉiutage.

Kiam aperis la vektportado sur Taishan-monto, tion oni ne scias. Tamen estas certe, ke la ŝtonoj, uzataj por konstrui templon kaj vojon sur la monto, ĉiuj estis vekte transportitaj. Kvankam servas tie telferoj, tamen preskaŭ ĉiuj bezonaĵoj sur la monto devas esti vektportitaj. En 1982 estis organizita grupo da vektportistoj kaj ĝis nun vektportis sur la monton pli ol 30 milionojn da kg da varoj, kiaj generatoro kaj aliaj elektraj ekipaĵoj. Kaldronego pezis tri tunojn kaj 120 vektportistoj ŝultroportis ĝin tritage en hotelon sur la monto. Multaj vojaĝantoj laŭdas ilian laboron. Ili ĉiuj estas ankaŭ bonaj grimpisto kaj iuj el ili estis premiitaj en konkurso de grimrado sur la monton.

Vektportisto en Taishan



Ĉu vi konas la ĉinan monon *Renminbi*?

Sur la monbileto "100 juanoj" estas 4 portretoj. Mi konas nur la portreton de prezidanto Mao Zedong. Bonvolu prezenti aliajn tri homojn kaj monbiletojn de Ĉinio.

NIKOLAO NEĈAJEV (Rusio)

de SHU MEI

KROM Nikolao Neĉajev, ankaŭ Georgo Abraham el Argentino kaj M. Allkivi el Estonio demandis pri la ĉina mono. Pri emisio de *Renminbi* ni publikigis la artikolon "Pri la ĉina mono *Renminbi*" en la 2-a n-ro de EPĈ, 1995. Ĉi-sube ni prezentos cirkulantan *Renminbi*.

Renminbi estas la unika leĝa mono en Ĉinio. De 1948, en kiu estis emisiita la unua serio de *Renminbi*, ĝis nun, oni jam emisiis 4 seriojn da monbiletoj. La nunaj monbiletoj estas de la 3-a kaj 4-a serioj emisiitaj en 1962 kaj 1987.

Kiel Nikolao Neĉajev skribis en sia letero, unu el la portretoj sur la monbileto en valoro de 100 juanoj estas de Mao Zedong (dekstre). Kaj la aliaj tri estas de Zhou Enlai, Liu Shaoqi kaj Zhu De (la dua, tria kaj kvara de dekstre). Dum la Novdemokratia Revolucio de Ĉinio, por renversi la regadon de la feŭda sistemo kaj la registaron

de militaristoj kaj forpeli la japanajn invadantojn el Ĉinio, ili gvidis la ĉinan popolon en malfacila batalo. Zhu De estis ne nur fondinto, sed ankaŭ komandanto de la ĉina popola armeo. Tial oni kutime nomis lin ĉefkomandanto Zhu. Liu Shaoqi estis gvidanto de la ĉina laborista movado. Krom milita laboro, Zhou Enlai gvidis ankaŭ laboron de la Komunista Partio de Ĉinio en la regiono okupita de Kuomintang. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio Mao Zedong laboris kiel prezidanto de la Komunista Partio de Ĉinio, Zhou Enlai — kiel ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, Zhu De — kiel prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj Liu Shaoqi — kiel prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko. Ili gvidis la ĉinan popolon en la socialisma konstruado.

Laŭdire, Mao Zedong oponis, ke oni presos lian portreton sur monbileto. Kial do la portreto aperis sur ĝi? Kiel s-ro

Sun Yishan, belartisto de la Ĉina Monfara Kompanio, diris, kiam oni desegnis la 4-an serion, oni ne desegnis la monbiletojn en valoro de 50 kaj 100 juanoj. Kiam oni petis proponojn, iuj esperis, ke estos emisiitaj monbiletoj en granda valoro, ĉar kun la disvolviĝo de ekonomio kaj plialtiĝo de la popola vivnivelo, oni bezonis grandan kvanton da konstanta mono por fari aĉeton. Tial, por oportuni cirkuladon kaj negocon, redukti koston por preso kaj emisio, la ŝtato akceptis la proponon. La 4-a serio konsistas el 9 specoj, t.e., 6 spceoj de monbiletoj en valoro de 1, 2, 5, 10, 50 kaj 100 juanoj kaj 3 specoj en valoro de 10, 20 kaj 50 fenoj. La desegnado de la monbiletoj en valoro de 1 ĝis 10 juanoj estis finita en la unueca kombinado kaj sur ĉiu monbileto estas portretoj de 2 nacimalplimultanoj de Ĉinio, kio markas, ke Ĉinio estas multnacia. Poste, la desegnado de la monbiletoj en valoro de 50 kaj 100 juanoj estis relative sendependa. Sur la

monbileto en valoro de 50 juanoj estas portretoj de laboristo, kamparano kaj intelektulo. Sur la monbileto en valoro de 100 juanoj estas portretoj de 4 forpasintaj gvidantoj de Ĉinio. Por esprimi estimon kaj sopiron al ili la desegnantoj decidis uzi iliajn profilojn.

Sur la dorsflankoj de la 6 specoj de monbiletoj estas pejzaĝoj de Ĉinio. Ili estas la ĉefa montpinto de Jिंगgang-monto, Granda Akvofalo ĉe Hukou de la Flava Rivero, montpinto Qomolangma, Wuxia-gorĝo de Yangzi-rivero, surmara ŝtona kolono Nantian Yizhu kaj Granda Muro. Ĉiuj desegnoj sur tiuj monbiletoj, ekz. fenikso, peonio, gruo, pino, hirundo kaj persik-floro distingiĝas per naciaj karakterizaĵoj.

Sur la monbiletoj de la 4-a serio legiĝas la vortoj han-aj, mongolaj, tibetaj, ujuguraj, ĝuang-aj kaj ankaŭ la nomo de la banko kaj la vorto pri valoro de monbileto en la han-lingva fonetika transskribo. Sur la fronto de monbiletoj estas ankaŭ koncernaj brajlaj vortoj. S-ro G. Abraham skribis en sia letero: "Mi legis en EPĈ artikolon pri Ĉinio. Ĝi estas ilustrita per bildoj de ĉinaj monbiletoj surhavantaj skribaĵon per arabaj literoj. Mi scivolos, ĉu tio estas normala sur la ĉina monpapero?" La arabaj literoj, pri kiuj s-ro G. Abraham demandis, fakte estas ujuguraj, kiujn uzas la ujuguroj en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Antaŭe la ujuguroj ne havis sian propran skriblingvon. Post la 10-a jc. islamo eniris en Xinjiang kaj la ujuguroj prenis la arabajn literojn kiel sian propran skriblingvon.

Kompare kun la 3-a serio, la 4-a posedas grandan falsimunecon. La filigrano estas ene de papero por monbileto. La monbiletoj en valoro de 1, 2 kaj

5 juanoj estas plene filigranitaj; la monbiletoj en valoro de 10, 50 kaj 100 juanoj estas fikse filigranitaj, en la maldekstraj flankoj de la fronto estas portretaj filigranoj de kamparano, laboristo kaj Mao Zedong respektive.

La 4-a serio estas presita el kontraŭfalsa fluoreska inko, kiu riveliĝas sub purpura lumo kun specifa ondolongo. Se oni metas la monbiletojn en valoro de 50 kaj 100 juanoj emisiitajn en 1990 sub la purpuran lumon, oni trovos, ke malsupre de la maldekstra flanko de la fronto de la monbileto en valoro de 50 juanoj aperas oraj literoj "WUSHI" kaj cifero "50" meze de la dekstra; kaj en la responda loko de la monbileto en valoro de 100 juanoj oraj literoj "YIBAI" kaj cifero "100". La 4-a serio havas ankaŭ metalan sekuran linion kaj estas presita per modernaj teknikoj.

Nia leganto M. Allkivi estas kolektanto de moneroj. En Ĉinio oni emisiis 3 seriojn da cirkulaj moneroj. La 1-a serio emisiigis en 1957. Ĝi estis farita el alojo de aluminio kaj magnezio, en valoro de 1, 2 kaj 5 fen-oj. Ĝis 1993 oni emisiis 19 specojn de monero kaj monbileto en valoro de 5 fen-oj, 25 specojn — en valoro de 2 fen-oj, 26 specojn — en valoro de 1 fen-o. La 2-a serio, farita el nikela alojo kaj kupra alojo, estis emisiita de 1980 ĝis 1986, en valoro de 1 juano, 50, 20 kaj 10 fen-oj. La 3-a serio, en valoro de 1 juano, 50 fen-oj kaj 10 fen-oj, estis emisiita en 1992. Kaj cetere en Ĉinio oni emisiis 19 seriojn da cirkulaj memormoneroj kaj 91 seriojn da memormoneroj. La diversaj memormoneroj el oro, arĝento kaj kupro plejparte temas pri gravaj historiaj eventoj de Ĉinio, eminentuloj de la mondo kaj raraj animaloj. ■



Ilustritaj gravaj eventoj en la vivo de Konfuceo

La nomita bildlibro jam estis eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en junio 1998. La libro enhavas 83 bildojn ĉiu kun lakona teksto.

Konfuceo estas kultura reprezentanto de la ĉina nacio kaj kultura famulo de la mondo. Li persistis en humaneco kaj oponis kontraŭ hegemoniismo. Li dediĉis sian tutan vivon al la popularigo de la popola edukado. Lia filozofio influas ne nur la ĉinan nacion, sed ankaŭ multajn orient-aziajn landojn.

En 1996 la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis "Analektoj de Konfuceo", kaj la ĵus aperinta bildlibro helpas vin pli facile kompreni la sentencojn kaj aforismojn de Konfuceo.

Formato: 26 x 18.5 cm.

Prezo: 10.00 USD.

Sendokosto: 3.00 USD.

Distribuata de la Distribua Fakto de "El Popola Ĉinio", P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Spaco de imago

POR la Pekina Normala Universitato la jaro 1991 eble estis signifoplena. En tiu jaro la universitato starigis nedevigan kurson: komento kaj studo pri sciencfikcia romano. Post sia starigo la kurso allogis sennombrajn interesatojn, ne nur studentojn, sed ankaŭ sciencfikciajn amantojn el aliaj lokoj de la lando. Foje ĝi akceptis eĉ 600 interesatojn. La kurso efektive ne povas kontentigi la deziron de ĉiuj ĉinaj sciencfikci-amantoj, kies nombro estas ĉ. miliono, laŭ la eldonkvanto de la ĉina gazeto "Sciencfikcia Mondo".

IMAGIPOVO ESTAS PLI GRAVA OL SCIOJ

En 1818, kiam en Ĉinio regis la dekadencan feŭda sistemo, Britio finis la industriaran revolucion. Tiujare Mary Wollstonecraft Shelley, edzino de la fama poeto Shelley, publikigis la plej fruajn sciencfikciajn romanojn "Frankenstein". Tio montras grandan progreson de scienco kaj riĉan imagipovon de la homaro pri la estonteco. Retrorigardante la sciencfikciajn verkojn de post la 19-a jarcento, oni ne povas kalkuli, kiom da iamaj "absurdaj" ideoj fariĝis jam realoj.

Albert Einstein diris: "Imagipovo estas pli grava ol scioj." Certe, sen lia imago pri la kosmo ne naskiĝus la teorio de relativeco. La 20-an de julio 1969 Neil Armstrong metis siajn piedojn sur la lunon, kaj realiĝis la revo de Gueles Verne pri "vojaĝo sur la luno", kiun li havis antaŭ 100 jaroj. Imagipovo ĉiam antaŭ scienc-teknika progreso atingis la alian

bordon de homa deziro. Oni povas trovi en la fruaj sciencfikciaj romanoj la signojn aŭ de la klonita ŝafo Dolly aŭ de la spacoŝipo "Marso-esploranto". Je la komenco la imago kaj eksperimento pri provtuba naskito faris surprizon, tamen nun centmiloj da provtubaj naskitoj ja vivas sub la kvietaj rigardo de la socio. Oni multe profitas de sia imagipovo. Kiam ni sentas la grandan scienc-teknikan progreson de la mondo en la 20-a jarcento, ni ankaŭ admiras la imagipovon de la homaro.


SUB LA GVIDO DE SCIENCFIKCIA ROMANO

En Ĉinio estas du periodoj de disvolviĝo de sciencfikciaj verkoj. La unua periodo komenciĝis en 1902, kiam Lusin tradukis "De la Terglobo al la Luno" de Gueles Verne. Ankaŭ Mao Dun tradukis romanojn de Herbert George Wells. Kiam la ĉinoj estis baraktantaj en tre malfacila tempo, tiuj du majstroj de la ĉina moderna literaturo vidis la aŭroron de sciencfikciaj romanoj, kaj la aŭtoroj de iliaj tradukitaj verkoj ĝuste estas eminentaj reprezentantoj respektive de "hardsciencfikcia romano" kaj "softsciencfikcia romano". Lusin iam diris: "Por gvidi la ĉinojn antaŭeniri, oni devas komenci de sciencaj romanoj." La kulturaj kaj ideologiaj pioniroj esperis disvastigi avangardajn okcidentajn sciencojn kaj teknikon inter ĉinoj pere de sciencfikciaj romanoj. Ili sinsekve tradukis kaj skribis tiuflankajn verkojn. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la devizo "Marŝi al sciencoj" gvidis verkadon de scienc-

fikciaj romanoj en Ĉinio en prosperan periodon. Nemalmultaj ĉinaj eldonejoj eldonis sciencfikciajn verkojn ĉinajn kaj alilandajn, kio inspiris legantojn ne nur de unu generacio. Aperis reprezentantoj Zheng Wenguang, Tong Enzheng ktp. kaj verkoj "Konstruantoj de Marso", "Norda Nubo" ktp. En 1978, kiam la sciencfikcia novelo "Morta Lumo sur Korral-insulo" gajnis premion de la ĉina novelo kaj poste estis adaptita al filmo, la sciencfikciaj romanoj en Ĉinio atingis la kulminon de sia disvolviĝo.

En tiu periodo la provado "popularigi sciencojn per sciencfikciaj romanoj" estis sukcesa, sed la utilo estis ne konvene troigita en la sekvantaj jaroj. La tasko ankaŭ pezis sur la disvolvigo de la sciencfikciaj romanoj en Ĉinio. Fine de la 70-aj jaroj okazis la epokfara ŝanĝiĝo en la rondo de ĉinaj sciencfikciaj romanoj, t.e. la verkistoj konkludis: Sciencfikciaj verkistoj devas trovi por sciencfikcia literaturo pli fundamentan valoron — "popularigi sciencon koncepton pri homa vivo" — ol "popularigi sciencojn".

Tiu iomete sentimentalita konkludo kiel epilogo de la unua periodo ŝajne aŭguris malfacilecon de la dua periodo. Tiam oni multe diskutis pri tio, ĉu la sciencfikcia romano apartenas al scienco aŭ al literaturo. Nek la sciencistoj nek la literaturistoj konfesis ĝin, kaj ĝi mem, kiel ŝvebanta nubo, ne povis trovi sian apartenon. Krome, tuj post la kultura revolucio (1966-1976), en la longe subpremata literaturo rondo aperis diversaj literaturaj



Ilustraĵo de sciencfikcia romano

pensfluoj kaj literaturaĵoj retro-rigardantaj la politikan malordon. Tiukaze dekadencis verkado de sciencfikciaj romanoj. Inter la malmultaj verkoj, pli bonaj estas “Lunluma Insulo” kaj “Songŝo en Milda Loko”. La unua temas, ke kiam en Ĉinio okazos la dua kultura revolucio, multaj homoj iros al alia ĉielkorpo profitante la okazon, ke UFO vizitos Ĉinion. La lasta priskribas, ke estontece en Ĉinio superfluos viroj kaj malmultos virinoj, la ĉefrolo produktos nombron da robotinoj por edzigi la superfluaĵojn, finfine robotoj regos la tutan mondon.

SERĈI APOGPUNKTON DE LA TERGLOBO

En la 90-aj jaroj la scienco vidigis tendencon pli rapide disvolviĝi en pli mallonga tempo-daŭro. Kaj pli fortiĝis la ligo inter la scienco kaj la ĉiutaga vivo de homoj. La progresanta epoko donis al imagipovo pli komfortan varmobedon. “Serĉi apogponton de la terglobo”, tiu imagoplena ideo nun furoras en la evoluintaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko. Kompreneble ĉinaj sciencfikciaj verkistoj ne volas postresti. Precipe tiam, kiam ili vidis, ke glavbatalaj romanoj tre popu-

lariĝis kaj infanoj dronis en japanaj sciencfikciaj karikaturoj, ili konsciis, ke ili devas klopodi por disvolvi verkadon de sciencfikciaj romanoj de Ĉinio. Pensante pri la brila estonteco, ili ne sentas sian nunan laboron tiel solena kaj kortuŝa kiel “oferado”. Kontraŭe, en la verkoj de la 90-aj jaroj vidiĝis pli riĉaj enhavo kaj koloroj. Instruisto Wu Yan, kiu gvidis kurson pri sciencfikciaj verkoj en la Pekina Normala Universitato, diris: “Almenaŭ, je mencio pri la ĉina nuntempa literaturo oni certe tuŝas sciencfikcian romanon.” Kaj la altiĝo de la verka nivelo de aŭtoroj garantias la kvaliton de la verkoj.

Tiuperiodaj verkoj prezentas multajn aŭspiciojn de prosperiĝo: diversaj formoj montras, ke pli multaj verkistoj sin liberigis de limigoj de tradiciaj hard- kaj soft-sciencfikciaj romanoj; lerta verkado forigis rigidecon; la enhavo pli nature ligiĝis kun la realo. Pli grave estas, ke iom post iom malaperis imitado al alilandaj verkoj kaj multiĝis ĉinaj karakterizaĵoj en la verkoj.

Han Song tiel pruvis en sia novel-kolekto “Kosma Steleo”. En la libro oni povas trovi ne nur antaŭvidon al la estonteco, sed ankaŭ la komunan embarason de nunaj homoj kaj budhisman ideon.

La libro “Duelo en Reto” priskribas triangulan amaferon en estonta ĉina universitato. Tiuj retuzantoj, nomataj “retmaniuloj”, tuttage dronis en komputera reto, intencante paradi per manipulado de komputero. Ili eĉ konektas la homan cerbon kun komputero por eniri en la reton, kio finfine kaŭzas ilian pereon.

Krome, ankaŭ “Odo de Vivo” kaj “Taoisto Yanshi” estas ĉefverkoj de tiu periodo. Kvankam ili ne estas tiel bonaj kiel eminentaj alilandaj verkoj, tamen ili utiligas la homan spacon de imago kaj vidigas al ni la aŭroron de Ĉinio en tiu spaco. ■

Aspiro al sunleviĝo

de SHI CHENGTAI

Fulmotondro, Cao Yu, elĉinigita de Liu Caisheng, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1997, 135 p. 15 x 21cm. Bind. Prezo: 10.00 USD Sendokosto: 3.00 USD

Sunleviĝo, Cao Yu, elĉinigita de Tan Xiuzhu, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1997, 142 p. 15 x 21cm. Bind. Prezo: 10.00 USD Sendokosto: 3.00 USD

Se oni parolas pri la nova literaturo aperinta post la Movado de la 4-a de Majo 1919 en Ĉinio, oni neniel ignoras atingon de la moderna dramo, ĉefe de la dialoga dramo, kiu certe estis influata de la eŭropaj teatraĵoj, ĉar la propraj ĉinstilaj teatraĵoj estis operoj, de zaĝju, poetika dramo de Yuan-dinastio (1279-1368), ĝis pekina opero. Ekde la komenco de la 20-a jarcento nov-formaj teatraĵoj debutis en Ĉinio, kaj sukceson akiris iuj dramistoj, inter kiuj Cao Yu elstaris. Liaj ĉefverkoj "Fulmotondro", "Sunleviĝo" kaj "Pekinanoj" multfoje sursceniĝis, eĉ en marto ĉi-jare lia dramo "Fulmotondro" estis prezentata de la Pekina Popola Teatro en la Ĉefurba Teatro de Pekino.

Kvankam en la du dikaj volumoj de "Ĉina Antologio" (1919-1949, 1949-1979) eldonitaj de la Ĉina Esp-Eldonejo (ĈEE) ne troviĝas dramo, tamen ĈEE iam eldonis dramojn de Guo Moruo (1892-1978), kiaj "Bronza Tigro" (1985), esperantigita de Seimin, kaj "Qu Yuan" (1987), esperantigita de Laŭlum. Nun aperis la Esperantaj versioj de du dramoj de Cao Yu, "Fulmotondro" kaj "Sunleviĝo", tio estas nova kontribuo de ĈEE al la Esperanta kulturo.

Cao Yu naskiĝis en 1910, en

dekadencan burokrata familio de la urbo Tianjin. Li de la infaneco ŝatis spekti teatraĵojn (lia patrino estis amanto de pekina opero). Kiam li studis en Nankai-mezlernejo, li, nur 15-jara, ludis rolojn de dramoj de Ding Xilin (1893-1974) kaj Henrik Ibsen (1828-1906), eĉ tra legis la Plenan Verkaron de Henrik Ibsen en la angla traduko. En 1930 li studis en la fakultato de eŭropa literaturo de Qinghua-universitato, Pekino, kaj la verkoj de Ŝekspiro kaj Eugene O' Neill tre interesis lin. Dum la studado en la universitato li verkis la dramon "Fulmotondro" (1933), en kiu li metis konflikton inter personoj de du familioj dum 30 jaroj en unu tagon kaj skribis tragedion faritan de la soci-sistemo en la malnova Ĉinio. La sukcesa sursceniĝo de tiu dramo decidis lian elstaran pozicion en la ĉina literatura historio.

Post la diplomiĝo el la universitato en 1933, li instruis la anglan lingvon en instituto de Tianjin, kaj en 1935 li verkis la duan dramon "Sunleviĝo", en kiu li priskribis panorame la urban vivon dum la 30-aj jaroj en Ĉinio. Li malkovris la obskuran realon de la tiama ĉina socio. La kvar aktoj de la dramo okazis en malsamaj tempoj de unu tago: aŭroro, krepusko, noktomezo kaj sunleviĝo, kaj ties 1-a, 2-a kaj 4-a aktoj estis en sama loko, en luksa hotelo de urbo, kaj 3-a estis en tria-klasa bordelo. La ĉefrolo, f-ino Chen Bailu, estis nomata "societema floro", simila al hetajro. Ŝi estis bela kaj diboĉema, sed kun iom bonkora naturo, fine ŝi adiaŭis nian mondon antaŭ la sunleviĝo. Tia sorto nin memorigas pri tiu de f-ino Kamelio sub

la plumo de Alexandre Dumas Fils (1824-1895), tamen Cao Yu ne celis doni al ni rakonton pri tragedia amo. Ĉi tie mi ne babilas pri la dramoj, karaj legantoj, vi mem turnu vin al la verkoj, ĉar en la du libroj mankas biografio pri la aŭtoro, mi preferas prezenti lin alifoje.

En 1940 Cao Yu verkis sian trian dramon "Pekinanoj", kiu gajnis al li pli grandan prestiĝon. Post 1949, en la nova Ĉinio li malmulte verkis kaj funkciis kiel vicedirektoro de la Centra Teatra Instituto en Pekino kaj direktoro de la Pekina Popola Teatro. Lia dramo "Serenaj Tagoj" (1954) estis kun stampo de la politika postulo. Li verkis ankaŭ prozaĵojn kaj eseojn. Lia lasta dramo "Wang Zhaojun" aperis en 1978. Li forpasis en 1996.


La tradukoj de liaj dramoj "Fulmotondro" kaj "Sunleviĝo" estas bonstilaj, ties geesperantigintoj Liu Caisheng kaj Tan Xiuzhu laboras longatempe en la redakcio de "El Popola Ĉinio", ankaŭ estas tradukintoj de pecoj de "Ĉina Antologio" (1949-1979). Precipe, ŝajnas al mi, ke s-ino Tan lerte reliefigis per Esperanto dialogon inter du virinoj, f-ino Chen Bailu kaj s-ino Gu, en la tria akto de "Sunleviĝo". Tia dialogo pravas dramiston Cao Yu elstara virtuozo priskribanta virinojn. Kaj ankaŭ la sukcesa, fidela tradukado de la originaloj pravas la pontlingvan rolon de nia Esperanto antaŭ la publiko. En la tradukoj ne troviĝas neologismoj, kaj flua klara stilo ĝuigos la plezuron de legado. Ĉiu samideano, kiu deziras koni Ĉinion kaj ĝian literaturon, legu tiujn du dramojn. ■

Freskoj de Dunhuang

Mogao-ŝtonkavernaro, nomata ankaŭ Milbudha Kavernaro, aliroiĝas al la krutaĵoj ĉe la orienta flanko de la Sablo-brua Monto, 25 km oriente de Dunhuang, Gansu-provinco, okcidenta Ĉinio. Ĝi, etendiĝanta ĉ. 1 600 m de sude norden, kun bone konservataj kaj enhavoriĉaj antikvaj ŝtonkavernoj, estas honorita kiel arta trezorejo de budhismo.

La konstruado de Mogao-ŝtonkavernaro komenciĝis en la jaro 366. En ĝi konserviĝas 492 kavernoj de multaj dinastioj, kun 45 000 kvadrataj metroj da freskoj. En la ŝtonkavernaro oni sentas sin kvazaŭ en vasta kaj impona arta labirinto. La versimilaj freskoj prezentas la antikvajn ĉinajn politikojn, ekonomion, kulturon, morojn kaj amikan kontakton kun aliaj landoj.

En 1996 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis tiun poŝtmarkoserion el kvar pecoj kaj unu miniatura filatelajo.





Niagaraj akvofaloj
de **LYUDMILA
FILATOVA**
(Usono)



Vintra
pejzaĝo
de **LUAN
JAUPI**
(Albanio)

ISSN 0032-4361

